

/

ARNE NOVÁK

ĈEĤA
LITERATURO

LAŬ LA BIRDPERSPEKTIVO

TRADUKIS
VINC. KROUŽIL

ELDONIS BARVIĈ & NOVOTNÝ, BRNO
PRESIS POLYGRAFIE, BRNO

En la ĉeĥa lingvo ĉiuj literoj estas prononcataj; **č, š, ž, ch, y** = ĉ, ŝ, ĵ, ĥ, i; diftongo **ou** = oŭ; **ř** = proksimume rĵ, **ň** = francan gn (Boulogne); **d', t'**, prononcu kiel d, t en la francaj vortoj diable, tiens; same prononcu konsonantojn n, d, t, se ilin sekvas i, í aŭ ě; post aliaj konsonantoj prononcu ě kiel je (ekz. turo = věž, prononcu vjeĵ). Supersignitajn vokalojn **á, é, ó, ú, ů, ý** sufiĉe longigu.

Akcento estas ĉiam sur la unua silabo.

Por disvastigi la konon pri mia nacio kaj tiamaniere frate alproksimigi ĝin al la aliaj nacioj; mi, kun afabla permeso de S-ro

univ. prof. D-ro ARNE NOVÁK

kaj kun valora helpo de mia amiko

prof. D-ro ST. KAMARÝT,

tradukis tiun ĉi verkon en la lingvon,
»kiu en la tagoj plenaj jam je prozo ravis koron mian«.

Estu permesite al mi dediĉi tiun ĉi tradukon

AL MIA KARA PATRINO.

kiu malproksime de mi sin preparis forlasi sian korpon kaj,
eksciinte pri mia amata laboro, esprimis deziron ne interrompi min en ĝi, ĝls
klam mi ĝin finos.

Ŝi atendis. . . kaj, kiam mi, fininte la tradukon, alveturis al ŝi,
ŝi, akceptinte mian konsolon, kviete ekdormis . . .

Brno, la 23-an de marto 1921.

Tradukinto.

Kiam la ĉeĥa nacio en la komenco de la XV. jarcento per la granda Husana¹⁾ religia movado, kunigita kun mirinda braveco milita, ekinteresis Eŭropon pri sia spirita vivo, tiam tiu ĉi nacio estis jam travivinta gravan kulturalan evoluon; daŭrintan kelkajn jarcentojn kaj produktintan diversfakan literaturon, kiu estas inter ĉiuj slavaj literaturoj la plej malnova. . .

La antikva ĉeĥa lingvo, kies fragmentajn skribajn postsignojn oni povas trovi depost la XI. jarcento, taŭgis bonege por literatura esprimado kiel pro la riĉeco tiel pro la nuancoj de siaj formoj kaj esprimoj; ĝi ja distingiĝis krom per la belsoneco kaj diverseco de la fonetiko per tiom disvolvita deklinacio kaj konjugacio kaj per tiom delikata sento por vortaj kaj frazaj diferencoj, ke rememorigas eĉ lingvon klasikan. Dum la mallonga eklezia epizodo Cirilomethodea²⁾ en la regno Grandmoravia³⁾ dum la IX. jarcento la lingvo akceptis pli ol unu kulturalan elementon el la dioserva antikva lingvo slava, sed poste dum la tuta mezepoko ĝi lernis de la lingvo latina, uzata ankaŭ en Bohemio same en publikaj dokumentoj kiel en lernejoj kaj preĝejoj: la ĉeĥa lingvo prenis el la internacia lingvo de ĉiuj kleraj nacioj okcidenteŭropaj multajn religiajn terminojn eĉ abstraktajn esprimojn, kaj krom tio ĝi multe alkonformiĝis al la latina sintakso, kontraŭ kies ekskluziva superregado nur la elpopola deveno de plimulto da verkistoj pli poste ĝin ŝirmis. Sed en la komenco de la XIII. jarcento komenciĝas sur la ĉeĥa teritorio grava lukto inter la honorinda instruisto kaj la juna, iom nelerta lernanto. La nacia lingvo penetras iom post iom en la formulojn, kantojn kaj dioservajn helpilojn, ja el la profunde pia animo ĉeĥa kreiĝas, kontraŭ klare esprimita deziro de la eklezio, malgranda literaturo de religiaj ĉeĥaj kantoj, el kiuj la du plej antikvaj kaj majestaj "Eternulo amu mina kaj "Sankta Vencealao, duko de la ĉeĥa lando" («Hospodine pomiluj ny» kaj »Svatý Václave, vévodo české země«) sonas ĝis nun sub la volboj de la katedralo de sankta Vit en la kastelo de Praha.

Tiu ĉi luktado inter lingvo nacia kaj lingvo latina, la internacia komprenilo de la pastra kaj laika klerularo, kiu jam estis kreinta eminentajn verkojn kronikistajn, estis finita per la venko de la lingvo ĉeĥa. Tio ĉi okazis en tiu renversa tempo, kiam la ĉeĥa, teritorie vasta ŝtato perdis sian nacian dinastion de Přemyslidoj, kaj kiam en la slavan landon rapide penetradis juraj, ekonomiaj kaj kulturaj influoj fremdaj, apogantaj precipe al la vasta germana koloniigo ne nur apud la landlimoj, sed ankaŭ en la urboj, ja eĉ en la koro mem de la patrujo: De la komenco de la XIII. jarcento progresas inter Ĉeĥoj jam seninterrompe spirita kaj laika literaturo skribata en la gepatra lingvo, gramatike tre progresinta; kiel en la aliaj literaturoj okcidentaj, tiel ankaŭ ĉi tie la evoluo de la versa beletristiko, fieranta pro la rimarkinda arto rimfarada, superis la prozon koncerne valoron kaj komencon.

Laŭ la enhavo kaj pensmaniero ĉiuj tiuj ĉikomencaj provoj imitas tendencojn kaj modelojn fremdajn, kiuj al la kulture juna kaj soifanta nacio alvenadis aŭ el Germanio aŭ el Francio enkondukante tien ĉi kiel asketajn idealojn ekleziajn;

tiel kavaliran klerecon kun ĝia aventureco kaj eleganteco, kaj iom pli malfrue, gajan humoron de la universitata studentaro. Sed ĉu ili penis pri interpretado de religiaj legendoj, aŭ traduko de la romantika Aleksandreido⁴), aŭ provoj de kavaliraj legendoj germanaj kaj bretonaj, aŭ freŝa liriko kaj petolaj paskaj scenoj en kiuj studentoj de Praha trovadis plaĉon, ĉiam en la ĉeĥa antikva poezio montriĝis celado prezenti pli ol simplajn tradukojn de la okcidenteŭropaj modeloj. La verkistoj, apartenantaj plejparte al la tri profesioj, pastraro, kavaliraro kaj studentaro, penis per siaj tutaj fortoj ĉeĥigon kaj naciigon de la fremdaj temoj: ili enmetis en ilin montraĵojn de la nacia saĝo, kiel proverbojn kaj sentencojn, plivivigadis ilin per realismaj observitaĵoj el la hejma ĉirkaŭo kaj aplikadis ilin al la vivmanieroj de sia patrujo. Tiamaniere la antikva ĉeĥa literaturo jam en la unuaj periodoj de sia evoluo akiradis la nacian originalecon, laŭ kiu ĝi esence distingiĝas de la najbaraj literaturoj. Ankoraŭ ĝis nun el ĝi parolas al ni la fiera kaj memkonscia Ĉeĥo, ŝatanta sian lingvon kaj ŝtaton, sprite meditanta pri la rimedoj por ilia plibonigo kaj preta ilin defendi kontraŭ fremdlandanoj; precipe verkistoj el la kavalira klaso, ekzemple la aŭtoro de la originala kroniko *de Dalimil*, distingiĝis per tia konscieco. La mezepoka Ĉeĥo rigardis sin kiel entuziasma kaj neŝancebla kristano, kiu neniel kontentiĝadis kun la dogma kaj liturgia parto de sia religio, sed kun granda morala decideco kaj vigla praktika sento insistis li, ke en la homa societo la principoj de Kristo estu efektivigataj kaj konsekvence praktikataj. Tial lia etika predikado estis regule kunigita kun akra kaj senkompata moralema kritiko pri la sociaj malbonaĵoj: en la antikva ĉeĥa literaturo tre rimarkindan lokon okupas la satiro, kiu sin apogas sur preciza kaj senrespekta observado de la realo kaj kun sukceso aplikas gnomon⁵) riĉecon de la popola konversacio. En tiuj ĉi esencaj kaj krudaj versaj lignogravuroj oni klare kaj senpere ekkonas ne nur la vivon de la antikvaj Ĉeĥoj en la XIV. jarcento, sed samtempe ilian moralan decidecon, penantan atingi purecon kaj honestecon de la tuta socio, komencante je la reĝo kaj finante je la neriĉa metiistaro.

Sed nur tiam, kiam de tiu ĉi vers- kaj rimfarado, plenigita per sukcoj de vivo, oni transiras al la antikva prozo ĉeĥa, disvolviĝas antaŭ niaj okuloj kompleta bildo de alta kulturo, kiun oni atingis en Bohemio dum la regado de la familio de Lucemburk, precipe dum la benita regado de Karolo IV., nomita Patro de la patrujo. La nacio, kies ŝtato atingis ne sole neestintan areon, sed eĉ perfektan politikan kaj juran maldanĝerecon, jam posedas sian juristan literaturon, apogantan sin sur la pli malnova tradicio. La religia entuziasmo, kiu, subtenata per malavareco kaj artista gusto de la imperiestro, estis konstruinta en Praha tutan arbaron de gotikaj preĝejoj, ornamitaj de skulpturistoj, pentristoj kaj juvelistoj, vidiĝis en biografioj de la sanktuloj kaj en kontemplaciaj verkoj. La intereso de la ŝtatestro pri estinto de la tuta lando instigis kronikistojn, ja eĉ la reganto mem prenis plumon de historiisto. Sed la plej grandan signifon por la spirita vivo de la nacio havis la kultnra faro de Karolo IVa, kiam li laŭ Parisa

modelo fondis la unuan centroeŭropan universitaton, kiu precipe en la fakultato teologia kaj artista kunvenigadis la eminentan klerularon el la orienta kaj meza Eŭropo. Ĝiaj instruitaj profesoroj, favorantaj la maljuniĝantan skolastikon de la realisma tendenco, ne faris mem konsiderindan laboron sciencan aŭ edukon, sed la plialtigo de la nivelo de prireligiaj studoj ĝenerale portis en Bohemio fruktojn same grandvalorajn kiel neatenditajn.

Unu el la unuaj lernantoj de la universitato de Karolo, la sudĉeĥa landbienulo *Tomáš ze Štítného* (Tomaso de Štítné) sukcesis kunigi naturan meditemecon kaj moralan severecon de viro el popolo kun la sciaĵoj de skolastika kaj mistika universitata teologio kaj la instruitan spiriton de dialektikulo kun la kompreno de praktikaj bezonoj. Kiam li revenis el Praha al sia heredita bieneto, li profundiĝis en la religian verkadon, pritraktante same la metafizikon kaj dogmatikon kristanan kiel la etikon. Tamen li ne skribis por instruitaj specialistoj en la scienca lingvo latina, sed por siaj infanoj kaj por la popolo en la modela riĉa gepatra lingvo ĉeĥa, pri kiu li estis majstro, kaj kvankam tiu ĉi ĝis tiam neaŭdita laika faro kaŭzis malkontenton ĉe teologoj, li konsekvence defendis la konvinkon, ke ĉiu homo devas esti instruata en sia lingvo gepatra eĉ pri la plej gravaj aferoj. Tiu ĉi principo pri alproksimiĝo de teologio al popolo kune kun severa fervoro morala, igas Tomason de Štítné, nomita ankaŭ; kaj certe kun rajto, patro de la ĉeĥa filozofio, la vera antaŭulo de la ĉeĥa reformacio malgraŭ tio, ke tiu ĉi bienulo ne deflankiĝis eĉ iomete de la eklezia dogmaro.

Je la fino de la vivo de Tomaso de Štítné jam de ĉiuj flankoj ekaŭdiĝis reformacia movado, ĉerpanta bruligeblan materialon el la plej malsamaj fontoj kaj ekkaptanta ĉiujn klasojn de la nacio. Morala indigno kaj ĥiliasma⁶) ekstazo de popolaj predikistoj estis brua preludio; el Francio premis resonoj pri kritika klopodo de Parisaj teologoj, pri regeneracio de l'eklezio; el Anglio en Bohemion estis alportita de John Wyclif multimema doktrino pri la eklezio, kiu vekis en la universitato de Praha eksterordinaran atenton; en la sferoj de vilaĝanoj kaj neriĉaj urbanoj vastiĝis opozicio kontraŭ la senmoraleco de pastroj kaj de la superaj klasoj ĝenerale. La kritiko pri la eklezia tradicio same penetrema kiel senkompata, kiun riskis la kuraĝa pensulo teologia *Matěj z Janova* (Matiaso de Janov) kaj el kiu li deduktis postulon de la konsekvenca reveno al la apostola kristaneco, ne trovis dezirindan akcepton. Nur *Jan Hus* (Johano Hus) sukcesis fari el la problemo reformacia problemon de la tuta popolo, kiam li debatojn pri religiaj aferoj transportis de la universitata katedro en la popolon kaj kiam li sian vidmanieron sigelis per la morto martira.

Jan Hus estis pli granda verkisto ol teologo. Kiel universitata instruisto, akirinta senmezuran popularecon pro la sukcesplena paŝo pri la naciigo de la universitato de Praha; li estis partiano de la tiama realismo kaj sen malfacilaĵoj kunigis ĝin kun la radikalismo de Anglo Wyclif en kies doktrino por iom da tempo li droniĝis tiamaniere, ke en siaj latinaj verkoj li prezentas malmulton pli ol parafrazon de la majstro Oxforda. Sed kiel ĉeĥa verkisto kaj populara

predikisto tiu ĉi ilo de simpla vilaĝano konis la vojon, kondukantan sendube al la koro de la popolo. Komprenante ĝuste la bezonojn de la estanteco, li forĵetis arĥaismojn kiel en la ortografio tiel en la lingvo kaj alkonformigis ilin al la viva uzado. Li zorgis pri l'evoluo de la popola preĝeja kanto en la lingvo nacia kaj alkondukis la predikistan arton, kiun li fine transportis el la preĝejo sub la liberan ĉielon, al granda perfekteco. Konforme al la spirito de la literatura tradicio antikvoĉeĥa li spicadis sian parolon per elementoj gnomaj, popolaj metaforoj, realismaj bildoj el la efektivo. Li ne forĵetis satiron, paskvilon, karikaturon, kiujn li multe uzadis en siaj verkoj polemikaj, sed kontraŭe, laŭ la personaj deklaroj precipe laŭ la famaj leteroj, senditaj el la malliberejo al siaj lernantoj kaj samlandanoj, li estis enkorpiĝinta afableco kaj delikateco. Ĉia literatura laboro de Hus reprezentas la tutan personecon, koncentrigantan en si ĉefajn fortojn de sia tiama nacio. Kaj en Conatancia la 6-an de julio en 1415 tiu ĉi persono supreniris ŝtiparon por ke ĝi per sia vivo defendu la ekkonitan veron kontraŭ la volo de la tuta koncilio kaj dum la ekmirego de la tuta Eŭropo.

La religia movado, kiu estis kaŭzita per la martira morto de Hus kaj kiu »kontraŭ ĉiuj« ekkaptis la defendan kaj venkan armilon neniel favoris la literaturan vivon. La severe asketa spirito Husana, kiu de tempo al tempo sin manifestis per radikala ikonoklasmo, kondamnis la arton ĝenerale kaj al la literaturo atribuis taskon sole instruan kaj religie kaj morale edukon. Tiamaniere dum kelkaj jarcentoj malaperis en Bohemio preskaŭ ĉia poezio, epika prozo kaj laika dramo nacilingvaj; se tiu ĉi specoj de arta literaturo ne trovis rifuĝejon en la plej malsupraj klasoj de la neliteratura popolo, ili plenumis taskon kiel simplaj helpiloj de religia kaj politika polemiko. Anstataŭ tio oni sin fervore okupis pri la religia

literaturo ĉiufaka. Denove kaj denove estis tradukataj fragmentoj el la Sankta Skribo, el kiuj poste estis farataj kolektoj bibliaj, ebligantaj komence al la skribistoj kaj iluminatoro, kaj post la eltrovo de libropresado eĉ al la presistoj montri sian lertecon. Instruitaj kaj popularaj predikistoj verkadis kolektojn de interpretoj pri bibliaj tekstoj, nomitajn postiloj, kaj ĉar ili volonte enŝovadis en ilin moralistajn kaj satirajn enmetaĵojn, tiuj ĉi verkoj estas ĝis nun fonto por la kono de la tiamaĵ cirkonstancoj. Sekvante la postsignojn de Jan Hus, la Husanoj zorgis pri la religia kanto, kiu krom la legado kaj interpretadoj de la biblio fariĝis esenco de ilia dioservo kaj kiu el la vidpunkto muzika kaj literatura estis alkondukita al granda perfekteco: el nenio alia ĝis la hodiaŭa tago blovas al ni la kruda kaj heroa Husana spirito per tiel ravanta ventego kiel el la ĥora kanto Táborana⁷⁾ »Vi, kiuj estas batalantoj de Dio« (»Kdož jste boží bojovníci«), kiu verŝajne interrilatas eĉ la personon de la geniala Husana gvidanto, blinda kaj majesta *Jan Žižka z Trocnova* (Johano Žižka de Trocnov) - sento por severa militista disciplino, kuraĝega batala braveco estas en ĝi kunligitaj kun la malnovtestamenta konfido al Dio kaj kun pure kristana entuziasmo por spiritaj bienoj. Kiam la doktrino Táborana kaj kun ĝi ja militpovo Husana, jam nepre senhalte disfaladis kaj malprogresadis, tiam la medita kampulo *Petr Čelčický*,

sudĉeĥa samregionano de Jan Hus kaj Tomáš ze Štítného en la solejo de la ĉeĥa kamparo finpensis la gvidprincipojn kaj misterajn problemojn de la ĉeĥa reformacio, elmetis ilin al akra kritiko kaj atingis rezultojn, kiuj, kvankam neigante la praktikon de vivo de Husanoj, tamen samtempe formadis fundamenton por novaj formoj de la spirita kaj morala vivo en Bohemio. Malgraŭ tio, ke ne sciis bone la lingvon latinan, kaj sekve ne faris akademiajn studojn, tamen Petr Chelčický havigis al si ĉian idean movadon de fremda kaj hejma origino, kiu malkvietigis Bohemion de la komenco de la XV-a jarcento; kun forta radikalismo kaj kun vigleco de geniala primitivulo, penanta ĉion simpligadi, li alvenis al ekstremaj konsekvencoj de la reformacia penado kaj interpretadis ilin per la kruda, sed potenca stilo, miksanta teologian analizon kun laŭtempa invektivo⁸) kaj praktikan filozofion kun demagogia predikeco. Absolute decide li kondamnis la tutan tradicion kaj organizacion eklezian kaj postulis revenon al la apostolaj regularoj, apogante sin samtempe je la biblio kiel la unusola aŭtoritato, traktata de li tre racionalisme. Li ne haltis ĉe la religio kaj eklezio; sed al sia detruanta juĝo de antikva kristana supernaturalisto li elmetis eĉ la ŝtaton kaj socian organizon. Eĉ tie ĉi li atestis sian kampulan radikalismom: li kondamnis la mezepokan dividon laŭ klasoj, neigis rajtigojn pri reĝa potenco kaj ŝtata leĝdonado, persekutadis kun malkonfido negocistojn, oficistojn, kaj opiniis, ke saole manlaboro de kampulo en vilaĝo estasa dioplaĉa profesio. Ĉi tie en la solejo, zorgante nek pri posedaĵo nek pri laika saĝeco, la vera kristano devis efektiviĝi regnon Dian sur la tero. Kvankam Chelčický mem estis spirito pasiema kaj atakema, li predikas ne kontraŭstari malbonon kaj forĵetis ĉian perforton; tial li ankaŭ kondamnis la Husanajn militojn kaj ordonis al sia kuraĝega nacio enŝovi la glavon en la ingon. Tiu ĉi kristana anarĥismo kaj vilaĝa primitivismo de Petr Chelčický apartenas sendiskute al la plej grandaj konceptoj de la mezepoka spirito kaj samtempe al la plej kuraĝaj esprimoj de la slava menso; ne estas miro, ke post 250 jaroj Lev Tolstoj salutis lin kiel sian antaŭulon.

Petr Chelčický, kiu estis dudek jarojn pli juna ol M. Jan Hus, mortis ĉirkaŭ la jaro 1460, sed jam antaŭ lia morto kuniĝis kelkaj liaj piaj kaj pensemaj lernantoj por enkonduki en la vivon liajn moralreligiajn principojn. Tiel fondiĝis en la orienta Bohemio la fama »Unuiĝo de la Ĉeĥaj Fratoj« ("Jednota bratří českých"), kiu per maniero tre malofta influis ne sole la kulturan vivon ĉeĥan, sed morale regeneraciis eĉ la naciojn fremdlandajn, precipe la koloniistojn en la norda Ameriko. En la klopoda laboro de kampulo, en la evangelia malriĉeco kaj frata helpo kaj solidareco vivis la unuaj Ĉeĥaj Fratoj en la montaj, malproksimaj regionoj, kontraŭstarante tie ĉi persekutadon de la regantaj eklezioj. En la komenco ili havis nek firman dogmon nek unuigan organizacion, aed paŝo post paŝo ili kreis perfekte organizitan societeton religian, kie ne ekzistis diferencoj rilate la posedaĵojn kaj klasojn. Ilia komenca staro kontraŭ laika saĝeco kaj eksterreligia kono lokigis ilin ekster la kulturon, sed frutempe ili komencis zorgi pri lerneja sistemo, uzis eltrovon de presado por disvastigi siajn

verkojn pridogmajn kaj siajn zorgajn kolektojn de religiaj kantoj, ja ili eĉ komencis zorgi pri sia historio, fondis la Fratan arĥivon, edukadis al si fake instruitajn historiistojn kaj en la XVI. jarcento ili estis gvidantoj de la kultura celado de sia tuta patrujo. Tio ne estis perfido pri la originaj severaj principoj, sed la necesa koncesio al la bezono de vivo; kiel ili en sian centron akceptis ankaŭ nobelajn kaj altrangajn personojn, se ili distingiĝis per la morala pureco, tiel ili fine alproprigis al si eĉ principojn de la humanismo, kiu tiam kun granda malfruiĝo ekregis la ĉeĥan kleron. La unuaj paŝoj de la humanismo sur la ĉeĥa tero, kien ĝi el Italio trapentradis pere la imperiestra kancelario kaj pli malfrue per la merito de la universitataj instruistoj, havis karakteron se ne rekte kontraŭnacian, do certe sennacian. Ĝi estis la granda plimulto da katolikaj sciencistoj kaj nobeloj, kiuj ne sentante simpatiojn al siaj herezulaj samlandanoj sin okupis en la arta lingvo cicerona pri dekoracia poezio, didaktika retoriko, kaj eĉepte ankaŭ pri meditoj ŝtataj. Nur pli malfrue ekamis la fremdan kulturan tendencon eĉ fidelaj Ĉeĥoj, konservantaj reformaciajn tradiciojn kaj ofereme laborantaj por la ŝtato nacia ; ili decidiĝis ne forlasi la gepatran lingvon, sed prilabori kaj perfektigi ĝin laŭ la humanisma idealo formaleca; en la tradukoj ili interpretis grandajn modelojn klasikajn; en la literaturon, tiel longe servantan al la ekskluzive religiaj polemikoj, ili enportadis progresintajn metodojn sciencajn. La plej belan penadon de tiu ĉi nacia humanismo montris la eminenta juristo *Viktorín Korenĉ ze Všeĥrd*, kiu en ampleksa verko prezentis same kompletan kiel kritikan bildon pri la maturiĝinta kaj disvolvinta juna kulturo ĉeĥa, kiun li sukcesis koncepti historie kaj defendi ĝian tradician sendifektecon kontraŭ ruzaj intencoj de romanistoj. Li montris sin kiel honesta kaj nobla Ĉeĥo ne sole per skrupula zorgo pri la pureco de la gepatra lingvo, kiu kuraĝis pritrakti temojn sciencajn kaj uzi esprimojn eĉ arte komplikitajn, sed precipe per la pure homa pensmaniero, protektanta subpremitojn kaj identiganta juran senton kun kristana justeco. Tie ĉi efektiva humanismo estis transiro al la humaneco.

De la progreso de humanismo profitis riĉe la populara prozo ĉeĥa, kiu per la abundeco kaj diverseco de fruktoj kaj per la signifo de verkistoj plene submetis la belan literaturon, kiu eĉ poste tute vegetadis. Multaj estis eldonataj verkoj natursciencaj kaj kuracistaj, verkoj ŝtatsciencaj, sed kun la plej granda plaĉo vojaĝpriskriboj, precipe notoj pri originaj vojaĝoj en Palestinon, kie la pia spirito ĉeĥa serĉis postsignojn de la Savinto, samtempe disvastigante siajn sciojn pri landoj kaj popoloj. Sed efektivan majstrecon la ĉeĥa prozo de la XVI. kaj XVII. jarcento atingis en la unusola fako: en historiografio. Grandaj okazintaĵoj de politika kaj religia historio plenigis seninterrompe la landon kaj al la generacioj ili eĉ ne permesis trankvile elspiri. Nobeloj kaj urboj luktis kontraŭ la regnestra povo, kiu de post la tempo, kiam la Habsburgoj ekposedis la ĉeĥan tronon en 1526, celis pli kaj pli absolutismon kaj severe punis obstinajn ribelojn; ambaŭ naciaj eklezioj, Husanaj utrakvistoj⁹⁾ kaj Ĉeĥaj Fratoj luktis reciproke, sed samtempe rebatis la potenciĝantan forton de katolikismo, apoganta sin je la favoro de Habsburgaj imperiestroj kaj kondukata de la ordeno jezuita; de la

germana kaj svisa protestantismo alvenadis subteno al la ĉeĥa reformacio sed kune kun ĝi danĝero de interna disfalo; el la ekscititaj ondoj de reciproka batalo de ĉiuj kontraŭ ĉiuj, de tempo al tempo aperadis nobla penso, de religia toleremo kaj ŝtate patriota interkompreniĝo de ĉefaj faktoroj en la landoj de la ĉeĥa krono.

La observado de tiaj fenomenoj, de malobjektivaj motivoj kaj karakteroj, kiuj malantaŭe de ili siluetiĝis, subtenis kompreneble psiĥologian akrevidon de historiistoj ne malpli ol legado de klasikaj modeloj de la antikva historiografio. Ĉar al tiu ĉi koncepto aliĝis eĉ faka studado de fontoj kaj dokumentoj kaj kompreno de la administra historio, la ĉeĥa historiografio leviĝis al vera scienca alteco; precipe kelkaj monografioj, fonditaj sur persona travivo de okazintaĵoj, efikas kvazaŭ per spirito moderna.

Sed krom ili ne mankis eĉ amuzaj, facile rakontataj kronikoj popolaj, kiuj estis kapablaj vekti intereson por la antikva estinteco, ekinteresigante per facila rakontmaniero, kiu kompreneble sole nesufiĉe kaŝis la nekritikecon kaj arbitrecon de la koncepto.

La perfektan interpaciĝon inter la spirito Frateca kaj klereco humanista en la dua duono de la XVI. jarcento plenumis la episkopo de la Ĉeĥaj Fratoj *Jan Blahoslav*. Li jam apartenis al tiu generacio, kiu akceptis la humanismajn doktrinojn de la germanaj universitatoj; de tie li proprigis al si tendencon, kiun Melanchton tiel precize karakterizis per vortoj »litterata pietas«. Laŭ la opinio de Blahoslav, en kies interno sciencisto multe superis teologon, la vera vojo al la perfekta pieco kaj kristana humaneco kondukas tra la perfekta klereco apoganta sin sur la kulturo same biblia kiel antikvoklasika; tiun ĉi kulturon Blahoslav konceptis laŭ la spirito de la XVI. jarcento kompreneble pli multe retorike ol filozofie aŭ artiste. Kiel Jan Hus, same ankaŭ Blahoslav, lia konscia sekvanto, interesiĝis pri gramatikaj demandoj, al kiuj aliĝis ankaŭ intereso prozodia; same kiel Hus li zorgis pri evoluo de predikarto kaj dioserva kanto, sed samtempe precipe studis ĝian parton muzikan; konforme al la tradicioj de la Unuiĝo de Fratoj (*Jednota bratrská*) li okupis sin, efektive kritike, pri historia esplorado.

Sed la ĉefverko de la kvankam mallonga tamen riĉa vivo de tiu ĉi kristana humanisto estis dediĉita al la biblio, el kiu la Frata Unuiĝo, fidela al la heredaĵo de Petr Chelčický, ĉiam eliris kaj al kiu ĝi ĉiam revenis. Kiel Luther same ankaŭ Jan Blahoslav decidiĝis -- laŭ la humanisma principo »ad fontes« - traduki la Sanktan Skribon el la originalo, purigita per la filologia kritiko, kaj tiamaniere emancipi sin de la Vulgata; lia lingva sento, gusto kaj klereco garantiis, ke li tion ĉi plenumos en la pura lingvo gepatra. Blahoslav mem tradukis Novan Testamenton, dume pro la traduko de Malnova Testamento stariĝis en la Frata Unuiĝo tuta komitato de spertuloj, el kies manoj dudek jarojn post la morto de Blahoslav aperis la fama »Biblio de Kralice«¹⁰) (bible Kralická), pro kiu la ĉeĥa nacio ĝis nun fieras kiel pro grandvalora juvelo de sia literaturo kaj kiu ĉiam denove estas represata de la Brita Biblia Societo. Pli valora ol la granda filologia kaj ekzegeza instruiteco, konservita en la teksta kritiko kaj en multaj rimarkoj, estas la klasika lingvo de tiu ĉi traduko mirinde kompakta rilate al deveno tiel

komplika. La Fratoj sciis kunigi vivecon de la popola parolo kun majesteco de la monumenta lingvo literatura, kiel ĝi evoluis dum la centjara tradicio; ili ĝuste ŝatis tion, kio estas komuna al la vasta amplekso de la ĉeĥa lingvo, dividita en diversajn dialektojn; ili sciis plene liberiĝi de humanista maleleganteco, kiu tiam regis, eĉ de malsana moda plaĉo por germanismoj kaj latinismoj tiel, ke en ilia traduko la Sankta Skribo iĝis komprenebla eĉ al la plej simpla kristano. Tiamaniere post Hus estis reguligita (sed kun pli granda profundeco kaj konsekvenco) la lingvo literatura - kio (krom la modela sietemo lerneja) estis la plej bela laika donaco de la Frata Unuiĝo al la nacio. Aliparte eĉ la plej bonaj samtempaj stilistoj kiel ekzemple la fervora polihistoro kaj senlaca eldonisto *Daniel Adam z Veleslavína* ne sciis sin liberiĝi de luksa kaj nenatura stila baroko, kiu per la influo de la humanismo de la XVII. jarcento superŝutis la literaturon por montri, ke la literaturo, kreskanta en flordoma studejo kaj perdanta ĉiun ajn kontakton kun la popola vivo, grave malsanas.

Ankoraŭ post la katastrofo de Blanka Monto (Bílá hora) en 1620, trafinta same kulturan evoluon kiel vivon politikan kaj religian kaj metinta la nacion de Hus kaj de Frata Unuiĝo kiel viktimo al la sanga arbitro de la Habsburga dinastio kaj al la jezuita kontraŭreformacio, la Frata Unuiĝo alparolis Eŭropon laŭ maniero, kuniganta la principojn de la kristana reformacio kun la scienco humanista. Ĝi okazis per la buŝo de la lasta episkopo de la Ĉeĥaj Fratoj nomita *Jan Amos Komenský* (J. A. Comenius), la granda instruisto de nacioj. Tio, pri kio la nobla ĉeĥa ekzilito klopodis dum sia loĝado en Svedio, Anglio, Holandio kaj Hungario kaj kion li enmetis en siajn tri latinajn verkojn »*Janua linguarum reserata*«, »*Orbis pictus*« kaj »*Didactica magna*« konataj en la tuta mondo, apartenas kiel kultura posedaĵo al la tuta homaro, nome: ke la edukitecon, kaj antaŭ ĉio la edukitecon per la gepatra lingvo, devas ricevi ĉiu sen diferenco rilate klason, genton kaj sekson; ke la junularo devas lerni ne vortojn, sed empirion, kion ĝi plej facile atingos per la proitplena instruado laŭobjekta kaj per la iom post ioma transiro de konkreto al abstrakto; ke krom la animo estas bezone kulturi ankaŭ la korpon, kion plej bone helpas la enkonduko de gimnastiko kaj ludoj en lernejon; ke lernejo direktata de bonvola instruisto devas esti loko de ĝojo. Tiujn ĉi principojn plejparte originalajn J. A. Komenský ne prezentis kiel ekkonojn memstarajn, sed kiel organajn partojn de granda plano enciklopedia, kiun li mem nomis pansofio; sian homan scion ĝis nun malkoncetrigitan li volis precize kaj celkonforme aranĝi en unuecan sistemon, apogantan sin same sur la kredo kiel sur la racio; pere de la pansofio homokristano alproksimiĝus al la plej alta celo, kiu estas: la ekkono de Dio kaj kuniĝo kun Li. Sed Komenský, antaŭlo de enciklopediistoj, progresis ankoraŭ pluen: en la sanga epoko de la tridekjara milito li revis pri harmonio de ĉiuj nacioj, ŝtatoj kaj religioj kaj tiel li antaŭdiris la Ligon de Nacioj.

Krom tiu ĉi ĝis nun nur duone realigita postlasaĵo al la mondo, Jan Amos Komenský postlasis al sia nacio multajn verkojn skribitajn nacilingve kaj adresitajn al ĝi dum la plej grava suferado, kiam Komenský mem vagis de loko

al loko, ne ekvidinte plu de la 35-a vivjaro sian kompatindan patrujon. Krom la libroj pedagogiaj, skribitaj ekskluzive aŭ origine ĉeĥe estas grandparte verkoj religie meditaj kaj morale konsolaj, plenigitaj per la persona ĉagreno de la pensulo, kiu samtempe estis poeto. El tiuj ĉi verkoj precipe mirinda estas la ampleksa alegoria verko »Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro« (»Labyrint světa a ráj srdce«), kie desegninte per la plnmo de Swift korpremantan bildon de la homa societo, tiu ĉi kristana filozofo forkuras al Dio, por trovi ĉe Li la veran feliĉon. Kvazaŭ adiaŭante J. A. Komenský en tiu ĉi verko resumis la ĉefajn trajtojn de la ĉeĥa literaturo en la mezepoko: severan seriozecon moralan, fonditan sur la pensmaniero kristana, vivan sencon por realo manifestantan sin per severa observado kaj reala desegnaĵo, plaĉon por alegorio, satiran inklinon kaj ian mankon de kompreno por la artista libereco; sed ĉio, kio en la literaturo antaŭ Komenský estas nur malkoncentrigita kaj duonmontrita, estas tie ĉi prilaborita en grandaj konturoj, kvazaŭ en la personeco de Jan Amos Komenský estus enkorpiĝintaj la plej bonaj penoj kaj sopiroj de la nacio de Hus kaj de Ĉeĥaj Fratoj.

Kiam en 1670 en Amaterdam la maljunula ekzilito Jan Komenský estis mortinta, etendiĝis super lia humiligita kaj silentigita patrujo tiaj mallumoj, kiajn oni vane serĉus en la historio de kulturaj nacioj. Senigita de popolo per sangaj ekzekutoj kaj perforta emigracio, senigita de la hejma nobelaro eĉ efektiva klerularo, malriĉigita ekonomie, malfortigita politike, Ĉeĥio¹¹⁾ fariĝis ekskluziva akiraĵo de la jezuita kontraŭreformacio, kiu ekkaptis la universitaton, lernejojn, preson, kaj komencis per vorto kaj fajro eksterman aktivecon kontraŭ ĉio, kio rememorigis la malbenitan reformacion. Sed por la forbruligitaj herezaj libroj la katolikaj fervoruloj, inter kiuj komence eĉ sinceraj patriotoj ne mankis, ne sukcesis doni ian kompenson, ĉar ilia asketa kaj moralista verkado rilatanta nek vivon de la nacio nek idean spiriton eŭropan, apenaŭ meritis nomon de literaturo laŭ ĝia sengusta mizereco; en la XVIII. jarcento ĝi ja iom post iom malaperadis. Latinaj kaj pli malfrue germanaj libroj plenigis Bohemion, kie eĉ la lerneja edukado estis malprogresiĝinta; la lingvo malboniĝis kaj difektiĝis pli kaj pli kiel per influo de la germana lingvo, tiel per malcela penado de nekleraj "puristoj"; la senco por la historia kontinueco malnature estis ekstermita per metodoj jezuitaj. En la mezo de la XVIII-a jarcento nenie estis espero, ke la nacio, tiel al la tero alpremita, povus iam rekonsciĝi. Sed en la vilaĝa popolo flameto de la sana vivo nacia ne estingiĝadis. La lingvo konservadis al si sian formon eĉ espriman precizecon, sian metaforan riĉeĉon, sian gnoman spicon. En la legendoj, tradicioj, diversloke eĉ en la memoroj de religiaj sektoj vivadis la historia tradicio kaj kun ĝi la nacia konscio. La kreema fantazio de la popolo ĵus en tiuj ĉi malfavoraj tempoj en Bohemio, Moravio kaj Slovakio kreis tiujn ĉarmajn, jen profunde melankoliajn, jen eksplode gajajn, iam ironie mordajn, alitempe ame delikatajn kantojn, plenajn de odoro de herbejoj kaj de arboriĉaj deklivoj, kiuj estis post nelonga tempo helpontaj artistojn kaj poetojn ĉe la serĉado kaj trovado de la pura poezio.

Se en la lasta kvinono de la XVIII. jarcento tamen pliboniĝis la situacio, el kiu poste disvolviĝis la tuta nacia regeneracio rilatanta ĉiujn tendencojn de spirita vivo, ĝi estis mirinda, ja kvazaŭ mirakla rezulto de la movigitaj eŭropaj fortoj kulturaj, trovantaj vivan eĥon en Bohemio fieriĝanta sub la morta krusto de malprogreso pro la sana kaj freŝa kerno nacia.. Du kleraj monarĥoj de la Habsburga familio, enportintaj laŭ la modelo de siaj kunuloj de aliaj eŭropaj tronoj en la antikvan kaj malprogreseman imperion efektivan klarecon kaj noblan filantropion, donis al la ĉeĥa popolo per ekonomiaj, sociaj kaj juraj reformoj la eblecon por prospera evoluo; inter la klerularo sub la registara protekto kaj influo de scienco kaj filozofio eksterlanda superis klareca tendenco, kiu per sia konsekvenca racionalismo, sentima kritiko kaj senrespekta neigado de la tradicio, signifis kompletan malvenkon de la jezuita kontraŭreformacio. La universitato fariĝis fokuso de la vera scienco, krom ĝi kreiĝis sciencaj societoj karakterizaj per la fervora vicleco koncerne la paroladojn kaj publikaĵojn, la kritikaj gazetoj konatigadis kun la scienca movado eksterlanda kaj ekstermadis la kutimiĝintajn antaŭjuĝojn, la popolaj ĵurnalistoj sciigis en la gazetoj kaj broŝuroj novajn ideojn al la plej vastaj klasoj. Sed ĝis kiam tiuj ĉi progresaj tendencoj klarecaj kaj filantropiaj venis rekte de la Wiena registaro aŭ estis de ĝi protektataj, ili portis kun si grandan danĝeron nacian, helpante samtempe la aŭstrian centralismon, kiu ne volis koni la historian ŝtatraĵton ĉeĥan kaj germanigadon, kiu intencis ĉiujn naciojn en Aŭstrio oferi al fantomo de unusola ŝtata nacio. Tiu ĉi premo, praktikata kun granda decido, vekis same decidan kontraŭpremon en Bohemio, kaj jen la komencoj de la nacia konsciiĝo. Kontraŭ la Wiena centralismo ekstaris la genta nobelaro, kies rajtoj estis grave minacataj kaj komencis fervore subteni la noblajn celojn de kelkaj scienculoj el la pastra kaj laika rondoj, kiuj leviĝis por defendi la ĉeĥan lingvon kaj ĉeĥan naciecon.

Sed ho ve! La ĉeĥa lingvo fidele konservata en la popola konversacio, ne estis uzata de kleruloj; ĝia gramatika strukturo ne estis esplorita, tiel ke malkleraj novemuloj, ne konantaj lingvan tradicion, fuŝis en ĝi sen halto; perdinte unu kaj duonon da jarcento de sia kultura evoluo, ĝi ne taŭgis por celoj sciencaj. Same malfacile estis apogi la nacian konsciiĝon sur la historian tradicion, kiu estis multe malklarigita per antaŭjuĝoj kontraŭreformaciaj; la plej gloraj epokoj de la nacia estinto estis aŭ forgesitaj aŭ kunigitaj kun malŝato kaj malhonorigo; la historiaj memoraĵoj estis malkoncentrigitaj kaj por esplorado ne atingeblaj; fabeloj de kronikistoj kaj legendoj de religiaj furiozuloj anstataŭis en la popolaj mensoj la realan bildon de la patruja estinto. Jen ĉie oferemaj kaj laboremaj instigantoj estis komencontaj laboron, kaj tial en la movado dum la klerula epoko la scienca esplorado lingva kaj historia ludas la ĉefrolon. Sed ĉar oni ne celis sole veki klerulojn, sed same varbadi por la afero nacia la klasojn popolajn, tial tiu ĉi scienca vicleco estas kunigita kun fervora klopodo populariga kaj popoleduka, trapenetrita per nobla filantropio kaj emancipa entuziasmo klerula. Por ke popolaj legantoj povu legadi la ĝustan kaj puregan lingvon, estis eldonitaj

por ili restaĵoj el la antikva ĉeĥa literaturo; por ilia instruo historia estis en facila formo verkataj patriotaj kronikoj; en la teatro kaj iom pli poste eĉ en la novelverkado estis al ili prezentataj scenoj el la historio laŭ naiva tekniko kaj kun multaj tiradoj patriotaj kaj demokratiaj; gazetoj kaj kalendarioj fortigis ilian konscion nacian.

Tiu ĉi unua kultura epoko de la nacia renaskiĝo, kiu finiĝas proksimume kun la militoj de Napoleono, havis karakteron parte sciencekritikan, parte popoledukan, sed ne mankis al ĝi ankaŭ la ideo politika. Jam la unuaj el la lingvaj esploristoj kaj verkistoj akcentis la parencecon de lingvo ĉeĥa kun lingvoj slavaj, kaj ne mankis multe, por ke tiu ĉi scienca opinio estu transportita en la rondojn publikajn: Ĉeĥoj ne staras izolitaj, sed ili estas membroj de unu granda familio slava, sur kiu en la tempo de bezono ili povas sin apogi, kaj precipe en Aŭstrio, kie la Slavoj faras plimulton, malfermiĝas libera kampo por la sana kaj sukcesa politiko aŭstroslava. Tiamaniere kun la nacia renaskiĝo disvolviĝis en Bohemio la ideo slava, donanta al la tuta movado karakteron universalan.

La tuta penado de la klerula scienco en Bohemio resumas kaj kulminacias en *Josef Dobrovský*, la granda personeco de instruita abato, konata inter ĉiuj Slavoj kiel patriarko de la slava filologio. Vastaj kaj profundaj scioj de lingvisto, literatura historiisto kaj historia esploristo estis kunigitaj kun la severa kaj klara kritikeco de la vera spirito de Bayle, ĉe kiu la objektiva kaj senŝanceliĝa amo al vero estis religio de la vivo. Posedante tiujn ĉi same naciajn kiel moralajn preferaĵojn, Dobrovský fariĝis ne sole fondinto de la gramatikscienco kaj de la sistema literatura historio ĉeĥa, sed li metis eĉ leĝajn principojn de la nova ĉeĥa lingvo literatura, de la poezia prozodio kaj kritika metodo. Li tion ĉi ne estas plenuminta sen amo al la ĉeĥaj lingvo kaj literaturo, kvankam li mem skribis sole latine kaj germane; sed malgraŭ tio li estis konvinkita, ke la spirita vivo ĉeĥa apartenas nur al la estinteco kaj ke ĝi pro tio estas sole taŭga objekto por scienca esplorado, sed neniel parto de vivanta evoluo; ke Ĉeĥoj estos kapablaj krei belan literaturon de la eŭropa nivelo, tiu ĉi brava skeptikulo ne volis konsenti.

Nur la generacio, veninta post Dobrovský kaj konsistanta plejparte el liaj lernantoj, decidiĝis en la romantika entuziasmo suprenlevi la duopan devizon: pri la nacia scienco, ne sole laŭ la temo, sed ankaŭ laŭ la lingvo kaj spirito kaj pri la nacia poezio; ĝi estis generacio heroa, ĉar ĝi ne sole donis la devizon, sed ĝin mem transformis en la sukcesplenan faron. Frunte de tiu ĉi generacio staras la efektiva fondinto de la nova ĉeĥa literaturo, *Josef Jungmann*, laŭ profesio filologo, sed samtempe viro de malofta estetika instruiteco kaj gusto. La ambaŭ ĉefaj, neeldireble klopodplenaj verkoj de Jungmann, nome la granda vortaro de la lingvo ĉeĥa kaj la amplekea nomaro de la hejma literaturo daŭrigas la vojon de Dobrovský, tamen laŭ la koncepto pri la nacio kaj ĝia estinto ili jam montras videblajn trajtojn romantikajn. La literatura estetiko de Jungmann, en kiu poste lernis la tuta nacia renaskiĝo, montras strangan miksaĵon de romantikismo kaj

klasikismo: ĝi postulas de la literaturo ĉeĥa, ke ĝi penu esti klasika konkurante kun modernaj kaj antikaj literaturoj, sed la veran klasikecon ĝi vidas sole tiam, kiam la nacio enpremas en sian poezion sian originan personecon, unuecan kaj neimiteblan. Ĉioma penado de Jungmann celis faciligi la vojojn kondukantajn al tiu klasikeco; li mem kreis modernan poezion lingvon, riĉigitan ankaŭ el la fontoj slavaj; per modelaj tradukoj el angla, franca kaj germana poezio li enkondukis en Bohemion ekzemplojn de alta arto literatura; kun delikata sento por ekstera organismo de la poezio li hejmgigis diversajn plej parte komplikitajn formojn versajn, dezirante, ke en Ĉeĥujo estu priokupata same la poezio akcenta kiel tempomezura. Li mem kreema poeto ne estis, sed lia kritika iniciativo, lia amika helpo, lia estetika gusto staris kiel bonaj sortulinoj ĉe la lulilo de la ĉeĥa nova poezio - li estis la ĉeĥa Herder, edukanto eĉ amato de la nacia romantiko.

La poezio, kiu komence provis siajn nelertajn fortojn en ludiloj laŭ Anakreono, en senspritaj religiaj kaj heroaj epopeoj kaj en lacigaj verkaĵoj priskribaj, havis mirindan feliĉon, ke inter la sekvantaro de Jungmann ekaperis du veraj poetoj: *Jan Kollár* kaj *František Ladislav Čelakovský*; en kelkaj aferoj ili estis rekte antagonistoj, sed ili ambaŭ estis fervoraj konfesantoj de romantismo kaj anoj eĉ apostoloj de la slava mutualismo. La evangelia predikisto el Slovakio, Jan Kollar, faris studojn ĉe la romantika universitato en Jena, kie li konatiĝis kun la filozofio de la historio de Herder, laŭ kiu la dia plano de la evoluo al humanismo efektiviĝas per grandaj naciekulturaj tutoj, ŝanĝiĝantaj sur la scenejo de la mondo. En la mezo de la pangermana movado de romantikaj studentoj li en sia flama animo firme konvinkiĝis, ke nun estas en la vico la Slavoj. Je ilia granda estonteco kaj etika misio li kredis des pli fervore, ju pli malserenaj estis liaj spertoj: en Thuringen li trovis sole tombojn de mortintaj kaj ekstermitaj Apudelbeaj Slavoj; lia sentimentale adorata amatino, en kiu li prezentis al si filinon de imagata diino de Slavoj, parolis sole germane, kvankam ŝi devenis el la slava sango; en Praha kaj en Slovakio, sia agadkampo, li renkontadis tute malgravan konscion slavan. Eble pro tio lia poezio, romantika laŭ formoj eksteraj sed klasika laŭ retorika esprimado, antikveca instruiteco kaj artplena spriteco, havis la plej grandan forton tie, kie ĝi ĝemis, plendis kaj tondris per la elegio. Lia granda alegoria verko »Filino de la Slava-diino« (»Slávy dcera«), kiu naskiĝis en ĉasta kaj delikata erotiko kaj finiĝis en antikveca pedanteco, estis maltima kaj grava instiga faro ne nur por Ĉeĥoj, sed por la tuta Slavaro; siatempe ĝi prezentis plej sisteme evangelion pri slava reciprokeco, sed nepolitike konceptita. En tiu ĉi ciklo de sonetoj kun elegia antaŭkanto Jan Kollár kreis arte perfektan tipon de instruplena romantismo, dekliniĝanta de l'vivo al libro, de l'estanteco al antikva estinteco, de l' realeco al platonismo kaj imitanta artajn kaj komplikajn formojn, en kiu la literatura kulturo trovas plaĉon.

La ĉeĥa poezio romantika havis ankoraŭ unu aspekton, kies prototipon oni devas devenigi de Herder. Se anglaj kaj germanaj romantikuloj per tuta animo ekamis la efektivan eĉ konjektitan popolan poezion, se ili kolektadis kaj science

studadis ĝiajn restaĵojn, se ili per siaj artefaritaj kreitaĵoj diligente imitadis ĝian senperan naivecon kaj freŝan koncizecon, ilia ekzemplo nenie povis vekti pli viglan konsenton kaj pli komplezan imitadon ol ĝuste en Bohemio, kie la simpla popola kanto, kolektata kaj imitata eĉ dum la tempo de la plej profunda ĝenerala malprogreso, estis saluto kaj garantio de la popola vivo. La unuaj provoj pri la imitado de la popola poezio okazis en la komenco de la ĉeĥa romantismo per tiu riska maniero, kiu en Anglio estis signita per la nomoj Chatterton kaj Macpherson. Homo tre entreprenema, sed verkisto mezkvalita kaj filologo diletanta, *Václav Hanka*, akirinta pli poste iajn meritojn en la slava propagando, dolore kun siaj kunuloj eksentadis, ke el la mezepoko konserviĝis al Ĉeĥoj nek origina antikva liriko popola, nek epopeo nacia, kiel oni tiam rigardis la poemojn de Homero, Nibelungen, rusajn »estintaĵojn« (»byliny«) 12) kaj serbajn kantojn heroajn. Kaj tiu ĉi amikaro decidiĝis forigi la mankon kaj laŭ la honorataj modeloj antikvaj, sed kun multaj el libroj ĉerpartaj rememoraĵoj ĝi poemigis du seriojn da malgrandaj delikataj kantoj amaj kaj verkoj bravulaj pri faroj de herooj kaj kantistoj, grandparte el la idolanaj tempoj. Tiuj ĉi falsaĵoj montrantaj sufiĉe grandan talenton poetan, estis eĉ kun siaj anakronismoj tradukitaj en la nekorektan antikvan lingvon ĉeĥan, transkribitaj laŭ la tre suspektinda maniero paleografía kaj kun teatraj efektoj »aperigitaj« sub la nomo »Manuskriptoj de Králové Dvůr kaj Zelená Hora« (»rukopis Královédvorský a Zelenohorský«). Nur post plena daŭro de tri kvaronoj da jarcento, la scienco malkaŝis la kuraĝan progreson de tro fervoraj patriotoj, kiuj tamen nemal multe sukcesis levi la nacian memkonscion per tiuj ĉi konjektitaj produktoj de la alta kulturo antikvoĉeĥa.

Sendispute artistajn rezultojn atingis *František Ladislav Čelakovský*, sprita lernanto de Jungmann, per la romantika metodo pri imitado de la popola poezio. La klara spirito de tiu ĉi instruita homo, en kiu laŭ tiama kutimo filologo kompletigis poeton, enhavis dispozicion klasikan, ja eĉ tiun de Goethe. Li amis spritaĵon, kiun li kiel morda satiristo kun plaĉo uzadis en ĉarmaj epigramoj, ne malestimis en la poezio didaktikon kaj tendencon pedagogian, trovante plaĉon en la rondaj formoj, kiujn li majstre poluradis. De sia juneco li enamiĝis en la popolan poezion ne nur de sia nacio sed same de ĉiuj gentoj slavaj, kolektis kaj publikigis ĝin kaj trafenetris tiamaniere al ĝia esenco, ke li estis kapabla per ĝia spirito senĝene verki poemojn, kaŝante kvazaŭ plene sian riĉan personecon. Tiujn ĉi memstarajn imitaĵojn, superantajn iliajn modelojn per la stila finpensado de tipaj trajtoj, Čelakovský nomis resonoj, resuminte ilin en la du kompletigantajn librojn, plenajn de natura naiveco kaj freŝa graciaeco: »Resonoj de la kantoj rusaj« (»Ohlas písní ruských«), kiu estas plejparte epika, dume en la »Resono de la kantoj ĉeĥaj« (»Ohlas písní českých«) superas liriko. Čelakovský ne havis mankon de lernantoj kaj imitantoj, el kiuj sole unu montriĝis kiel efektiva majstro. Ĝi estis *Karel Jaromír Erben*, kolektanto de popolaj tradicioj kaj origina poeto. Pro sia »Bukedo« (»Kytice«) li devus esti envicigita inter la plej grandajn baladistojn de ĉiuj epokoj kaj nacioj: tiuj ĉi malserenaj, ja eĉ

timigaj fabeloj kaj legendoj popolaj elkreskas el la naturo, sub aspekto de arto de humoro; laŭ sia drama emocio ili ektuŝas la tragedian limon, sed tiun ĉi emocion venkas la luma kaj bonvola pensmaniero de la poeto; la pentrado per vorto, verso kaj rimo efikas sugestie - ĝis nun ne malaperis la radikaodoro el tiu ĉi origina floro de la ĉeĥa romantiko.

Aliaj poetoj, kiuj en la tempo de patriota romantismo ĉeĥa ĉirkaŭis Kollár'on kaj Čelakovský'n, estas de longe forgesitaj. Ilia signifo ne bazis sur fako artistata, sed sur ilia fervora kaj konsekvenca influo vekanta: kun simplanima sentemo ili prikantadis la pejzaĝan belecon de sia patrujo, la majestecon de la lingvo nacia, honorindan pasintecon de sia lando, la vastiĝon eĉ esperplenan estonton de Slavoj; la senton patriotan ili miksadis kun ama delikateco; la efektivan lirikon ili kompletigadis per tendenca fervoro kaj tiujn ĉi noblajn kaj naivajn dezirojn ili endeseĝnadis en tiun duonidilian, duonfilistran vivon, al kiu en la unua duono de la XIX. jarcento la reakcia Aŭstrio kondamnis siajn popolojn. Krom la liriko servis al la samaj celoj la historia romano, kiu en la plej bonaj okazoj direktiĝis laŭ la granda modelo de Walter Scott, neniam ĝin atingante; paralele kun ĝi evoluis romantika dramo de kavalira stilo, tranĉanta la kontinuan de kroniko je aktoj kaj scenoj kaj kontentiĝanta plie per nacie eduka tendenco ol per la enhavo de vivo. La nomo de unu el tiuj ĉi fervoruloj konserviĝis por la estonteco pli eble nur per feliĉa okazo: la oferema demokrata ĵurnalisto, vaganta aktoro *Josef Kajetán Tyl* estis produktinta tutan amason da historiaj tragedioj, scenaj fabeloj, popularaj farsoj, ploremaj rakontoj el la burĝa vivo same kiel historiaj rakontoj, malgrandaj romanoj el la popola kaj pro eraro eĉ el la aristokrata vivo. Oni ilin plu ne legas; se oni ilin ludas, ili estas akceptataj kun bonvola indulgemo, sed lia delikate sentimentala kanto »Kie mia hejmo« (»Kde domov můj«) fariĝis nacia kaj fine eĉ ŝtata himno kaj per sia kortuŝa melodio ĝi rememoras al la mondo, ke estis la patriota entuziasmo de la romantika epoko, kiu multege helpis la konsciiĝon de la ĉeĥa nacio.

Inter tiom da epigonaj malgrandeguloj leviĝas malserene kaj majeste la personeco de la genia poeto, al kiu la romantismo ne estis sole literatura moto: sed sorto de la vivo. Al *Karel Hynek Mácha* ne estis donitaj pli ol 24 jaroj da vivo, sed kiom tiu ĉi juna juristo el proletaria familio estis kapabla dume travivi! La germana idealeca filozofio, pola romantiko, influo de Byron estis por li nura transiro por konscii sin mem kaj por kompreni sian riĉan internon, turmentitan duone de la volupta pasio, duone de la konsumiĝa malsato metafizika; la sovaĝa pejzaĝo romantika kaj malluma nokto kun siaj sonoj estis konformaj al la scenerioj de animaj statoj kaj procedoj de Mácha. Kun malluma kaj forta kuraĝo li, la unuan fojon en la ĉeĥa poezio, enprofundiĝis en la postmortan misteron kaj en la demandon pri la celo kaj valoro de la homa vivo; li estis suferinta teruron pro la senkompata indiferenteco de la naturo por la homa doloro; meze de sentimentaluloj li lasis sin ekflamigi per la flamo de la amo neestingebla, sed nekontentigebla. Li elkantis ĉion, kontraŭ kio li luktis en la animo, kaj li faris tion per la poezia stilo, kiu en la 30-aj jaroj de la XIX. jarcento estis en Bohemio

nepra novo: stilo samtempe muzika kaj kolorplena, plenigita je la dramatika movo eĉ humorema sugestio, kiu per la melodio kaj riĉeco da bildoj tentas kiel nekontraŭstarebla amanto en la momento de la erotika ofero. Li faris brilajn kaj reformemulajn ekprovojn preskaŭ en ĉiuj fakoj de la bela literaturo, kiel en tragedio tiel en historia romano, sed lia propra postlasaĵo, krom la filozofia liriko, kiun li enkondukis en Bohemion, estas la poemo »Majo« (»Máj«), kie turmento de la amo, pasia rilato al la naturo kaj metafizika elegio elektis la formon de la versfarata rakonto de Byron. La poemo, dum sia deveno kondamnata, sed pli poste adorata, fariĝis al ĉiuj kleraj Ĉeĥoj rekta simbolo de la naturo kaj amo kaj al la poetoj devizo de la pensa kaj artistika kuraĝo.

La devizo pri la nacia scienco, eldirita de Josef Jungmann, falis sur fruktodonan teron. Estis fondataj sciencaj revuoj kaj eldonistaj kompanioj por publikigado de la instruaj verkoj; oni persiste prilaboradis la scienca terminologion por ĉiuj fakoj; oni zorgis pri tio, ke la filozofia ideo ĉirkaŭigu la fakan scion. Plej sukcese prosperis la scienco historia, kiu sin povis apogi sur la kritika materialesplorado, entreprenita en la epoko klerula; enhavoplenaj rezultatoj instruaj estis kompletigataj per la vekiga influo de la historiaj verkoj kaj de iliaj ideoj ne sole je la ĉeĥa sed ankaŭ je la tuta slava mondo. Gvidantoj de tiu movado estas du fidelaj amikoj el la skolo de Jungmann, Slovako *P. J. Šafařík* kaj Moraviano *Fr. Palacký*. Antaŭ ol ili trovis sian propran mision en la scienca historio, ili faris preparon poezian, estetikan kaj filozofian, kaj kvankam estante ankoraŭ nur junuloj maturiĝantaj sur la fruktodona tero slovaka ili influis tiel spiritan vivon de la nove renaskiĝinta nacio.

Pavel Josef Šafařík, kiu parton de sia same klopoda kiel oferema vivo pasigis inter Jugoslavo, daŭrigis la vojon de Josef Dobrovský, sed laŭ la romantika koncepto de la historio. Ne limigante sin je la antikva epoko ĉeĥa, sed rigardante sammezure la arĥeologion de ĉiuj slavoj, li atingis per la kombino de la metodoj historia kaj filologia fideblajn rezultojn, kiuj la sciojn pri la Slavoj metis sur novan fundamenton. Li pruvis, ke la Slavoj estas tielsame praloĝantoj de Eŭropo kiel la Grekoj, Romanoj, Keltoj aŭ nacioj germanaj kaj romanaj; li priskribis iliajn loĝejojn; precize li difinis ilian etnografian disbranĉiĝon; atentigis pri ilia origina klereco kaj alta nivelo morala. Tie, kie li siajn sciencajn verkojn kompletigis per konsideroj filozofiepolitikaj, li proklamis kun apostola nobleco kaj konvinkeco, ke en la estonto ilia tasko estas, plenumi verkon de humaneco kiel kontrasto kontraŭ la perfortema ideo germana kaj tiamaniere efektivi la diecon sur la tero.

La saman filozofion pri la historio atingis en sia dumviva verko František Palacký, la pli juna kunulo de Šafařík. Kiam li dudekkvinjara en 1823 transloĝiĝis el Slovakujo en Praha'n, li decidiĝis dediĉi sin al la profesio historiografia kaj skribis por la nacio vastan kaj severe scienca historion kun la priskribo Husana movado sur grava loko. Por tio estis necesaj longtempaj preparoj, kiujn Palacký plenumis kiel eble plej vaste kaj profunde. Li prijuĝis kritike la verkojn de siaj antaŭuloj; traesploris la arĥivojn en- kaj eksterlandajn;

kolektis kaj eldonis memoraĵojn de la ĉeĥa movado religia; organizis publikadon de la antikvaj dokumentoj kaj li mem prenis sur sin la plej grandan parton de tiu ĉi tasko; traesploris la topografiajn rilatojn en Bohemio. Fariĝinte ofica historiografo, li komencis unue eldoni la historion ĉeĥan en la germana lingvo; sed post kiam en 1848 la publikaj cirkonstancoj liberiĝis, li komencis eldoni sian klasikan verkon »Historio de la nacio ĉeĥa en Bohemio kaj Moravio« (»Dějiny národu českého v Čechách i na Moravě«), kiun li, sepdekokjara maljunulo, finis; sed ĝi etendiĝas de la plej antikvaj epokoj nur ĝis la tempo de la suriro de la Habsburga familio sur la ĉeĥan tronon. La senlaca kolektistoj kaj spritplenan kritikistoj kompletigas la majstro de la historia raportado, kiŭ estas brila rakontanto pri okazintaĵoj eĉ psikologia karakterizanto de ĝiaj iniciatoroj; kune kun ili iras mano en mano artisto de komponado kaj vera klasikulo de la kvietaj kaj monumenta stilo. Se la ĉapitroj pri la plej antikva historio pro manko de severa kritiko antikviĝis, kompanse la kulminaciaj kaj vaste pritraktataj partoj pri la Humanismo kaj pri la Frata Unuiĝo konservas ĉiam sian valoron. La tutecon al la historia verko de Palacký liveras la ideo filozofia, tre klare kaj evidente esprimita. La historio de la ĉeĥa nacio ne estas amaso da okazoj, mekanikaj fortoj kaj materiaj kondiĉoj, sed ĝi estas la efektiviĝo de la dia plano. De la pratempo luktas en ĝi Slavoj, la portantoj de la libereco kaj humaneco kontraŭ germanoj, la reprezentantoj de la materia forto kaj etendiĝema perforto; de la tempoj Husanaj aliĝas al tio konflikto inter la libera esplorado kaj la eklezia kaj ŝtata aŭtoritatoj. Ĉu oni povas dubi, ĉe kia partio Palacký vidis la estontan venkon? Li ne povis rigardi sian taskon kiel finita, kiam li en sia historio donadis al la ekvekiĝinta nacio la biblion de ĝia vivo. Viro de morala decideco kaj kreema volo, kia Palacký estis, transiris nature de la historio ankaŭ al la politiko, tuj kiam la cirkonstancoj tion permesis.

Tiuj ĉi cirkonstancoj okazis en 1848, kiam sekve de la revolucio falis la absolutisma Aŭstrio, kaj kiam ekbrilis, almenaŭ por nelonga tempo, povebleco de la konstitucia vivo sur la parlamenta fundamento. Palacký ne tute feliĉe forŝovis la konsekvencajn ŝtatrajn programojn kaj laboris por federaciigo de Aŭstrio laŭ la principo nacieca; lin kondukis la espero, ke venis la tempo, en kiu estos eble starigi aŭstroslavismojn; tiun ĉi tendencon esprimis ankaŭ la granda slava kunveno en 1848, kie slavismo jam sin prezentis kiel forto politika. En la politiko li estis la ne malpli granda aŭtoritato ol en la literaturo kaj scienco kaj li ĝuis ĝenerale honoran nomon »Patro de la nacio« (»Otec národa«). Estis por li speciala feliĉo, ke lian politikon disvastigis inter la popolo la talentega verkisto, fondinto de la ĉeĥa ĵurnalismo *Karel Havlíček*, kiu ĉiam batis la konvenan kordon, ĉu li influis per la enhavriĉa politika klarigo la juĝokapablecon de la popola legantaro, ĉu atakis la sanan ĉeĥan senton per la Voltaire-a spirito de satirikisto, respektanta nek ŝtatajn nek ekleziajn grandulojn, aŭ li sin turnis al la konscienco de sia granda fidela legantaro. Sed la aŭstria registaro dum la reakcia periodo, sekvinta baldaŭ post la revolucio, mortpelis la danĝeran publikiston Havlíček, silentigis Palacký'n kaj inter la ĉeĥaj patriotoj tute sufokis la fidon je

la ebleco regeneracii Aŭstrion per la federacio de la nacioj, inter kiuj Germanoj nepre volis ludi rolon de gvidantoj. Tial, kiam post la reakcia intermezo la parlamentismo denove revenis en la kadukan imperion, la ĉefaj politikistoj kun la konsento de Palacký decidiĝis por la ŝtatrajta programo historia.

En la sufokiga atmosfero de la reakcia subpremo, kiam la poezio denove fariĝis unusola rifuĝejo de la noblaj mensoj, kreis siajn ravajn verkojn la unua grava verkistino de la literaturo ĉeĥa *Božena Němcová*, dolĉa kaj melodia poetino en la prozo, en kies koro mizero de la proletariino kaj humiligo de la edzino ne povis ekstermi amon al la naturo kaj al la homo. Ŝi travivadis la romantikan kulton de la popolo kaj studadis ĝian etnografian vivon; ŝi alproprigis al si emancipajn tendencojn tiamajn kaj ekinteresiĝis precipe pri la demando koncernanta moralan edukon virinan. Nenio el tio ĉi malgrandigis ŝian puran instinkton kaj ŝian originan rilaton al la tero: ŝiaj popolaj herooj elkreskas el ĝi kiel herbejaj floroj kaj fruktodonaj arboj. Ŝiaj rakontoj, precipe la romana serio da rememoraraj bildoj de la popola vivo »Avino« (»Babička«), estas entute kanto pri juneco de la tero kaj boneco de la homa koro, kiu nenie batas per tiel seninterrompa batado kiel sub la kitelo de vilaĝano kaj sub la bluzeto de vilaĝa knabino.

Kun Karel Havlíček kaj Božena Němcová ekparolas novaj celadoj ideaj kaj tendencoj literaturaj, esence distingiĝantaj de la patriota romantiko, kiu ĉirkaŭ la jaro 1848 estis tute eluzita, ja eĉ morta. La juna generacio literatura, kiu preskaŭ dek jaroj post la revolucio renoviĝis kaj finpensis ĝiajn celojn, donante al ili laŭtan kaj lertan esprimon en multaj revuoj kaj gazetoj proklamis senkaŝan batalon kontraŭ la literatura romantismo. Ĝi pensis laŭ maniero de pozitivismo kaj materialismo; la decidan konvinkon demokratian ĝi pligraviĝis per la viva senco sociala; ĝi deturnis sin de la estinteco al la problemoj de la estanteco. Aktualeco, realeco kaj progreso estis la ĉefaj devizoj de la junaj verkistoj, kiuj el la fremdaj literaturoj apogis sin je Byron, Heine kaj George Sande, el la hejma literaturo je Mácha, Havlíček kaj Němcová. Ilia realismo, tendence kolorita, studis ĉe la moderna homo pli volonte tion, kio donas al ĝi valoron ĝenerale homan, ol tio, kio donas al li nacian karakteron; eĉ en la kritiko tiuj ĉi tre kleraj kaj sentimaj literaturistoj klopodis liberigi la vojon por ideoj de la kosmopolita interkompreniĝo.

La praktiko ne akordiĝas ĉiam kun teoriaj principoj de la skolo, kaj la organa evoluo literatura ofte forkondukas la verkiston de la juneca programo. Tio ĉi montriĝis ankaŭ tiam. *Vítězslav Hálek*, unu el la gvidantoj de tiu ĉi-grupo, en sia mallonga kaj senlaca vivo kreis multebranĉan verkaron, en kiu estas reprezentitaj eble ĉiuj specoj literaturaj, kompreneble kun pli ol unu prunto el la fremdaj literaturoj. Tio, kio de li ĝis nun vivas, estas sole realismaj bildoj de la figuroj kaj okazintaĵoj el la mezobohemia vilaĝo kaj facile skizitaj kantoj pri la hejma arbareto kaj herbejo, kie la malofta talento estas akompanata kun la spontanea lirismo de la simpla koro. Simila, preskaŭ birda lirismo de la natura senzorgema infano sonas el la vastega versa produktado de la nuntempa

patriarko de la ĉeĥa poezio *Adolf Heyduk*, kiu precipe feliĉa estas tiam, kiam li trinkigas siajn strofojn el la ĉeĥaj fontoj de la slovaka kanto aŭ kiam li ilin vestas per la profunda verdaĵo de sia amata Pošumaví (regiono de la montĉeno Ŝumava = Böhmerwald). Multe pli komplikita personeco ol ambaŭ tiuj lirikaj poetoj estis *Karolina Světlá*, la tre memstara daŭrigantino de Božena Němcová, sendispute la plej granda epika talento de la tuta skolo. La simpla instinkta rilato de la homo al la naturo kaj al la vivo, kiu estas la propra supozo de ĉiuj laboroj de Božena Němcová, por ŝi ne valoris; ŝia patosa kaj severa menso konservis rilate al la realo distancon, kiun ĝi transvolbis per la tre malfacila reflekso. La ideajn kaj moralajn problemojn, kiuj ekscitegis ŝian propran internon, ŝi enmetis kun granda dialektika kuraĝo en la supernaturajn figurojn de la vilaĝaj romanoj priskribantaj la vivon sur la apudlima montĉeno de Ještěd¹³): ĝi estas konflikto inter la virina amo kaj familia honoro, konflikto inter la granda pasio de la vivo kaj morala volo al ofero, problemo de la etika kresko de virino, batalo inter la aperigita religio kaj libera deismo. Tamen ne malpli potence ol tiuj ĉi tuthomaraj problemoj parolas al ni el la grandtrajtaj kaj patosaj romanoj de Karolina Světlá genta originaleco kaj karaktera individualeco de ŝiaj tragediaj montanoj.

Krom la romana verkado de Karolína Světlá perdiĝas en la hodiaŭa perspektivo la ne malpli vasta kaj ideo grava, sed artiste ne maturiĝinta verkado de la pli junaj prozistoj de ŝia generacio, kiuj plejparte klopodis verki modernan romanon socialan, trapenetritan per la emancipaj kaj revoluciaj penoj de la kvina klaso. La vojo, kiu kondukas de *Pfleger Moravský* al *Antal Stašek* kaj precipe al *Jakub Arbes*, montras evoluon de la sentimentala romantiko al la seniluzia pozitivismo kaj al la racia kritiko de la vivo, senigita de iluzioj kaj ornamaĵoj. La analogio kaj komplemento de la ĉeĥa prozo en la 60. kaj 70. jaroj estas la sociala dramo, per kiu la generacio de Neruda kaj Hálek intencis hejmiĝi sur la scenejo, direktata kun granda zorgo kaj honorinda senco por respondeco, tiel la tendencojn kiel la formojn de la okcidenteŭropa teatro post romantika. La plej alta revo restis la sociala tragedio, ĉerpanta el la pure modernaj konfliktoj, sed al ĝi sole unu fojon

alproksimiĝis *F. V. Jeřábek*, dume la dua egale klera kaj entuziasma teatra verkisto *Emanuel Bozděch* kontentiĝadis per la bruetaj kaj fajreraj ludoj salonaj, sprite verkitaj el la okazoj kaj intrikoj de la rokoka kaj empira mondo.

La propra gvidanto kaj la daŭra spirita centro de la tuta skolo estis *Jan Neruda*, rivalo de Hálek, fidela kamarado de Heyduk kaj ama amiko de Karolina Světlá. Al la literaturo, kiu ne estis por li profesio, sed sorto, li dediĉis ĉion, eĉ la intiman feliĉon. Li, ne sufiĉe ŝatata dum la vivo, fariĝis post la morto unu el la plej karaj nomoj de la ĉeĥa literaturo. En siaj komencaj verkoj Jan Neruda, fiera kaj malparolema filo de malriĉega familio de Praha, aperis sole kiel preciza kaj malarda observanto de la realo kaj amara kritikanto de la vivo eĉ de la propra interno. Dume la ironia juĝo de la juna malamiko de ĉiu sentimentaleco kaŭterize disigadis la proprajn sentojn, kaj la konciza stilo de la memstara lernanto de Heine poemigis rezultojn de tiu ĉi procedo en la krudaj kaj

enhavoriĉaj malgrandaj strofoj, la horizonto de la realista observanto larĝiĝadis. Li ekkonis la eŭropan okcidenton, maron kaj Romon eĉ Malgrandan Azion kaj el siaj vojaĝaj spertoj li verkis la unuan ĉeĥan artistan vojaĝpriskribon, trape-netritan per la mondaero. Li travivis la socialan mizeron de sia naskiĝurbo kaj montris ĝin en la skizoj same veraj, kiel instruplenaj. Li ĵetis sin en la ĵurnalismen kaj restis ĉe la unua granda ĉeĥa ĵurnalo »Nacia gazeto« (»Národní listy«) ĝis la morto kaj post Havlíček, kiu pruvis, kiamaniere estas eble kun la ĵurnalista metio kunigi la popoledukadon, li plenumis majstre precipe en la felietonverkado la unuiĝon de literaturo kun ĵurnalo. Ne zorgante la skolajn doktrinojn eĉ la fakulan ilaron, li senĉese skribis pri la teatro, libroj, pentraĵoj kaj edukante la guston de la publiko, li mem iom post iom fariĝadis kritika aŭtoritato. Li provis enmeti en la poezion, la sciencan inspiron kaj surprizegis la publikon per vico da kantoj kaj himnoj pri aferoj kosmaj, kiel ili aperas al la moderna homo konanta la teleskopon kaj spektralan analizon. Kiel kosmopolito, konanta bone la kulturajn bezonojn de sia patrujo, li malkonstruadis »la ĥinan muron«, dividantan la ĉeĥan kulturon de la alia mondliteraturo. Dum tiuj ĉi kulturaj servoj farataj al la ĉeĥa nacio Jan Neruda mem gajnis plej multe - li trovis komikon- kaj kapabliĝis por sentplena delikateco de granda lirikisto. Lia humoraĵa ĉefverko estas »Rakontoj el Mala Strana«¹⁴) (»Malostranské povídky«); ĝi estas malgranda galerio da personetoj kaj sortoj el la pitoreska hejmo de Neruda sub la kastelo de Praha, en la virtuoze majstrita formo de realismaj skizoj, sur kies fundo krom la rido brilas la larmoj. Eĉ liajn versojn travarmigas bonhumoro kiel en la baladoj kaj legendoj plenaj je naiva kredo kaj eterna homeco, tiel en la kanta postlasaĵo »Simplaj motivoj«, (»Prosté motivy«), kie en la jara ciklo de sezonoj parolas kun la naturo izola kaj ekscitema koro de la vera viro. Sed la lasta verko de Neruda, postmorta libro de patriotaj meditadoj kaj preĝoj, ne estas humoraĵa, sed tragedia kaj patosa: anstataŭ la propra ĉagreno de la poeto sangas tie en la humoro de la Paska Vendredo la doloro de tuta lia popolo kondamnita per Dio travivadi la grandecon de sufero. La evoluo de Jan Neruda pruvis grandparte la samon, kion oni povis observi kiel ĉe Hálek tiel ĉe K. Světlá, t. e. ke la pena kaj sentmaniero de tiu ĉi generacio, kiu komence montris sin kosmopolita kaj internacia, evoluis iom post iom evidente laŭ la tendenco nacia. Dediĉante sin al kulto de la nacio kaj ĝia estinteco, partoprenante en la lukto por la rajtoj lingvaj kaj kulturaj, la poetoj ennaĝadis en la ondojn de la politika batalo, kiu ĵus tiam, apogita sur la ideo ŝtatrajta kaj fortiĝinta per entuziasmo slava, turnadis sin tre energie kontraŭ Wien'on. Kiam poste inter la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj eniradis literaturon la pli junaj verkistoj, ili neniel kaŝis tiun ĉi tendencon, ja ili eĉ revenadis al la idealoj de la nacia renaskiĝo; tradicia idea enhavo reviviĝis en la liriko kaj epiko de zorgema kaj kolorriĉa formo, akirinta instruon ne nur ĉe la okcidentaj majstroj, sed eĉ ĉe la slavaj poetoj; paradema kaj peza versa pentraĵo kuniĝis kun la sonora kaj arta retoriko.

Kiam la tipa parolanto de la nova skolo nacionalisma kaj slavofila, oratora lirikisto de flamaj koloroj kaj de forta spiro, kampulo kaj bohemo¹⁵), *Václav Šolc* frutempe pereigis sian riĉan talenton per aventuroj de nekvieta sango, tiam en tiu ĉi literatura kunularo montriĝis kiel la plej nobla personeco *Svatopluk Čech*, kiu longtempe estis rigardata kiel la plej granda poeto de sia nacio. El la feliĉega hejmo en la kamparo la timema revulo alportis al si amon al la idilio, al la kampulo, al la origina popola kulturo; de la patro idealisto li ricevis slavan entuziasmon, konvinkon demokratian kaj liberalan, naturan religion de humaneco; kiel knabo li kun kompreno legadis la verkojn de Mácha, Kollár kaj de rusaj Byronanoj. Plenaĝiĝinte li ekkonis la Nigran maron kaj Kaŭkazon; travivis kun granda vereco provojn de la socialaj revoluciuloj penantaj pri la regeneracio de la maljuniĝinta Eŭropo; entuziasmiĝis per militvenkoj de la slavoĵ Balkanaj. La severan solecon, kiun li donis kiel taskon al si mem, li dediĉis al servado al la arto, kiu trovis en li skrupulan ĉiziston de la bildoj kaj versoj, ĉiam nekontentiĝintan je la atingitaj rezultatoj kaj ĉiam denove malesperintan pro tio, ke la sanktiga inspiro daŭras tre mallonge. Sed tiu ĉi mirinda poeta instrumento ne estis destinita por verkado de sensacioj kaj artista volupteco; per ĝi Svatopluk Čech esprimadis sian idean kaj sentan koncepton pri la patrujo kaj Slavoĵ, perceptitan laŭ la principoj de la progreso kaj humaneco. La plej kutima poema formo, kiun Svatopluk Čech uzadis de sia juneco, iom post iom ĝin pliperfektigante, estis la versa rakonto de Byrona origino enhavanta multajn elementojn meditajn en la peza dekoracia kadro; tiamaniere li prilaboris la historian materialon hejman; precipe el la epokoj de Husanoĵ kaj Bílá hora, alegoriajn okazintaĵojn enkorpiĝantajn la ideajn, sociajn kaj politikajn krizojn de Eŭropo en la krepusko kaj de Slavoĵ komencantaj efektivigadi sian novan mision, romaneskajn scenojn el la Oriento eĉ simbolajn temojn legendajn - post la per la pensoj ŝarĝita diskuto leviĝas ĉiam riĉa kaj malŝparema verko de la plena peniko de historio- kaj pejzaĝo-pentrismo. Pli malfrue li eksopiris foriri en la kvietan rifuĝejon de la ĉeĥa kamparo, inter la popolajn karakterizajn tipojn, rezistantajn kontraŭ la klereco, ĉion niveliganta, sed gravaj problemoj sociaj kaj ekonomiaj fortimigis la poeton el sia idilio, devigante lin mediti pri ili, paroladi kaj laŭ la maniero popoleduka entuziasmiĝi por ili. Naciaj kaj socialaj tendencoj, kuniĝantaj modernan demokratismen kun slavjanofilismo, kaj fratan ŝatadon de laboristaro kun patriotaj tradicioj, igis lin lirikisto, kiu anstataŭ konfesi intime, esprimas per la rondaj popolaj kantoj kolektivian sentadon samtempan; tiam Čech atingis la plej ĝeneralan popularecon. Sed lia modesteco kaj delikateco ne permesadis al li trovi plaĉon en la pozo de nacia profeto kaj persisti en ĝi. Svatopluk Čech posedis spritokapablecon kaj kapricon, kiu amuziĝante facile satirigis kaj sonante per ĉarmaj tintiloj, ridetis; liaj versfarataj fabeloj, plenaj de fantazio kaj sprito, apartenas al la plej ravaj floroj de la gaja Muzo en Bohemio kaj kompletiĝas kun liaj arabeskoj kaj humoraĵoj, kies antikvotempe komforta kaj delikate pentranta prozo vivigas kaj eternigas malgrandan horizonton de la burĝaro. Multaj estis imitantoj de Svatopluk Čech,

sed neniu el ili iĝis lia egalvalora lernanto; pli eble pro preferindaĵoj de la karaktero, pro la nobleco de la tendenco kaj efikeco de la esprimado ol pro valoroj artistaj glorata inter ili estas *Eliška Krásnohorská*, la virtuoziino de la poezia retoriko, la anima gvidantino de la feminista movado en Bohemio, kiu per metala vireco kaj akra racionalismo ofte sufokas la veran inspiron poezian.

Ĉiaman fidelecon al la ideoj valoroj kaj sentaj impulsoj de la nacia renaskiĝo konservas la poetoj slovakaj. Slovakio kune kun Bohemio faris la etnografian eĉ kulturan tuton, malgraŭ tio, ke politike ambaŭ landoj estis disigitaj jam en la mezepoko; la religia reformacio de la Husanoj kaj de la Ĉeĥaj Fratoj profundigis kaj firmigis tiun ĉi unuecon. El la protestantaj klasoj, nacie konsciaj kaj neniel tuŝitaj de la disiga influo kontraŭreformacia, eliris la ambaŭ grandaj Slovakoj, poeto Jan Kollár kaj sciencisto Pavel Josef Šafařík, kiuj tiel potence influis la renaskiĝon de la ĉeĥa nacio; en ilia proksimeco elkreskis eĉ František Palacký - ili estis spirita ĉeĥa nobelaro, kiu la idean kaj literaturan unuiĝon de Ĉeĥoj kaj Slovakoj rigardis kiel memkompreneblan premison de la vivo. La malcentralizaj penoj de kelkaj katolikaj fervoruloj en Slovakio, gvidataj de la instruita filologo *Antonín Bernolák* kaj liturature reprezentataj de la epikisto kaj idiliisto de la klasika skolo *Jan Hollý*, ekprovadis specialan literaturon en la dialekto, sed ricevis malgrandan akcepton. Nur senpere antaŭ la revolucio en 1848 tiun ĉi apartiĝeman celadon renovigis la klera junularo protestanta kaj, dank' precipe al la pensplena akrosento kaj publikista fervoro de la senlaca *Ludevít Štur*, ĝi proklamis la lingvan eĉ literaturan disiĝon inter la tuta Slovakio kaj Bohemio - por la necedemaj fervoruloj tiu ĉi lukto por memdestino ne de la nacio, sed de la gento, parolanta en kelkaj dialektoj; estis rezulto de romantika koncepto pri la nacio kaj samtempe esprimo de la slavjanofila deziro, starigi kulturon sur la pli popola fundamento, kiu en la oriento estas konservita en la pli granda pureco; rilate la politikan praktikon ĝi estis malfeliĉa paŝo, kiu okazis en la tempo tre konvena por hungaraj politikistoj. Palacký kaj Šafařík avertis el Bohemio, poetoj kiel Božena Němcová kaj Adolf Heyduk klopodis pri la renovigo de la unueco, sed la evoluo estis jam nehaltigebla. Dume en Moravio la penado pri la genta originaleco de la lingvo kaj literaturo eĉia alkondukita al perfekta harmonio kun la konscio de la plena unuiĝo nacia, pri kio pli poste meritis precipe la granda filologo de bona popola radiko *František Bartoš*, Slovakio de la fino de la 40-aj jaroj posedas propran literaturon poezian eĉ publikigan, skribatan ne en iu el la naturaj dialektoj popolaj, sed en la arta lingvo literatura, nove farita; sole la literaturo scienca mankas al ĝi. Laŭ la spirito de la ideoj gvidantoj de la slovakaj apartiĝemo metas la tieaj poetoj sur la antaŭan lokon de sia poezio glorigadon de la origina kulturo kaj karaktere pureco de la kampara popolo kaj surmontara naturo, sur kies florantaj brustoj ĝi elkreskas; ofte ili sukcese uzas karakterizajn elementojn kutimvortajn. Post *Andrej Sládkovič*, la romantika fantaziulo pri amo kaj naturo, kiu estis samtempulo de Božena Němcová, en la 70-aj jaroj transprenis sur sin tiun ĉi taskon la granda majstro de la plena poezia vorto kaj de la malsimpla artista kulturo *Hviezdoslav*,

kiu atingis klasikecon en la epikaj verkoj, pritraktantaj montaranajn popolajn karakterojn el Orava. La patriarko de la slovaka literaturo, kiu per la bibliaj vortoj ofte ekĝemis pri la subpremo de siaj samlandanoj, ĝisatendis la politikan unuiĝon de Bohemio kun Slovakio kaj salutis ĝin entuziasme. Konante la propran fundon de la slava animo nacia; li sciis liberiĝi de eraroj de la pli maljuna generacio, kies parolanto, sentimentala lirikisto kaj rakonta kronikisto de la slovaka landbienularo *Svetozar Hurban Vajanský*, rifuzadis ĉiun interkompreniĝon kun la pli forta kaj plimatura gento frata.

Tradiciismo, vastiĝanta en la literaturo kaj proklamata en la poezio de Svatopluk Čech kaj de liaj samtempuloj, signifis ankaŭ la renovigon de la historia romano, en kiu jam la patriota romantiko trovis plaĉon. Sed nun en tiu ĉi fako, treege amata de la popola legantaro, estis farita multobla progreso. Idee la ĝustan direkton montris Fr. Palacký per sia koncepto pri la nacia historio: ne plu atentoveka mezepoko, sed idee grava reformacia estinteco ĉeĥa, precipe de la Husana epoko estis ankaŭ ĉe la romanoverkistoj ĉefe preferata. La demokratia ideo de la ĉeĥa klerularo montris sin ankaŭ per tio, ke kiel fundo de la historia okazado estis metita la popolo, kies vivo estis lumigata per etnografia detaleco. Se tie ĉi, almenaŭ en la komenco, ne estis atingita vera realisma certeco en la desegnado de la karakteroj kaj en la logiko de la okazoj, oni dediĉadis gravan, plieble sciencon ol artistan penadon por precize esplori koloron de la tempo, antikvan manieron de la konversacio, medion antikvecan: La legantaro, obstine fidela al la tradicioj de la ĉeĥa renesanco, kontentiĝis longatempe je la historiaj rakontistoj, kiuj la antikvajn formojn de la historia rakonto plenigis per vekigaj tendencoj; pro tio daŭra populareca akompanis la monotonajn kronikojn de la »Husana pastro« kaj elegisto de la Blanka Monto *Václav Beneš Třebízský*, malgraŭ tio, ke al tiu ĉi malriĉulo je motivoj mankis kiel la anim-esplora kapableco tiel karakteriza talento. Nur iom post iom eksopiris la ĉeĥa inteligentularo je la science artistaj bildoj de la antikvotempa vivo. Ĉi tie la plej grandan verkon plenumis *Alois Jirásek*, la senlace produktama amato de la popola legantaro, laŭ profesio historiisto kaj pedagogo; la akordo de tiuj ĉi tendencoj elsonadas eĉ el lia ampleksa laboro verkista. La vervon rakontistan kaj la firman arton de tranĉa rakonta desegnado li montris jam en la juneco per la enhavoplenaj rakontoj el la malkvietaj tempoj, plenaj de aventuroj kaj instigoj, trosatigaj per sango kaj ombroj. Sed tiutempe li ilin malestimis, ĉar li ekcelis la vastajn verkaĵojn, kies abunda, grandparte dispecigita historio estis elfarata per la grandaj fortoj historiaj. En du cikloj kaj du memstaraj verkoj disvolviĝas la Husana movado, kies komponantoj estas postsekvataj en la diversaj klasoj kaj centroj en Praha kaj en la kamparo, de suda Bohemio ĝis orienta Slovakio, pro kio devenas impreso de la tuteco. Kun la intuicieco ankoraŭ pli varma kaj kun la sentado ankoraŭ pli penetrema *Alois Jirásek* pentris la nacian renesancon, precipe en la duspeca speguliĝado: la unua ciklo priskribas klasojn de la Prahaaj provincaj patriotoj de la kastoj literatura kaj scienca, la dua ciklo prezentas la vivon de la popolamaso de la limregiono České Kladsko ¹⁶⁾, kie estis la hejmo de *Jirásek*.

Tie ĉi kaj tie li per la historia evokacio subtenadis la delikatan sencon por la templimo inter rokoko kaj empirio eĉ regionajn rememorojn pri la naskiĝloko en la nordorienta Bohemio. Se al tiuj ĉi cikloj mankas la dezirinda koncentriĝo, ja ofte eĉ la scena unueco, Jirásek per la du verkoj sukcesis prezenti majstrecajn montraĵojn de la historia rakontado: »Hundŝildanoj« (»Psohlavci«) la grandtrajta epopeo pri la vilaĝana obstino kaj pri la ĉeĥa lukto por rajto, kaj »Mallumo« (»Temno«) rava elegio de la nacia malprogreso en la XVIII. jarcento; tie la simpla desegno de plisimpligitaj karakteroj, tie ĉi la riĉa pentro humorplena atingis monumentecon. La libroj de Jirásek - krom la romanoj kaj noveloj ankaŭ kelkaj tro naivaj historiaj teatraĵoj - estas skolo de la nacia energio, fonto de forto por la lukto por la malnova bona rajto, do morala faro krom sia valoro literatura; ne estas miro, ke la dankema nacio pardonas al sia meritplena edukisto la psikologion ialoke supraĵan, verkadon nedisciplinan kaj ellaboradon iafoje rapideman. Tute sen tendenco, tamen kun malofta evokacia arto revivigis la formojn de la vivo en la XVI. kaj XVII. jarcento la kunulo de Jirásek, instruita kaj sprita arĥaikisto *Zikmund Winter*, la virtuozo en la miniaturdesegnado kaj groteska humoro; lia intuicio, travivinta ja sian studan tempon en arĥivo, sukcesis renovigi la antikvan Praha'n multe pli nature, ol tion faris per la maniero scienca ĝia historiisto *Václav Vladivoj Tomek*, la malarda kaj enuiga konservativulo el la skolo de Palacký.

Ĝi ne estas la lasta merito de Jirásek, ke li montris, kiel grandaj ideaj movadoj, okupantaj la klerularon, ekkaptadas en Bohemio eĉ la klasojn popolajn; tiamaniere ĉe li la historia romano kunfandiĝis kun la psikologiaj studoj de popola animo. En tiu ĉi tendenco li trovis multajn sekvantojn, sed ili sekvadis tiun ĉi procedon precipe en la estanteco aŭ en la ne malproksimaj epokoj de la XIX. jarcento. Pro io ili superis eĉ Jirásek'on mem: kun la forta intereso ideo ili sekvis la penson ĝis al ĝiaj plej kaŝitaj radikoj; ili pli profunde studis etnografion; kiel veraj realistoj ili rigardadis la fenomenojn animajn laŭ maniero pli malsimpla kaj kun pli kuraĝema veramo; ili ne estis simplaj rakontistoj pri la vivo, sed eĉ la poetoj de ĝiaj misteroj. Tri diversaj regionoj kaj popolaj gentoj trovis interpretantojn de sia animo. Sudbohemio, lulilo de Hus, Žižka kaj Chelčický, esprimis sin per sia samregionano, la slavjanofila pensulo kaj ĵurnalisto *Josef Holeček*, kiu ĉe siaj samregionanoj malkaŝis la religian kaj moralan postlasaĵon de la Ĉeĥaj Fratoj. Kulture malsimpla poetistino *Tereza Nováková*, el la skolo de K. Světlá, demetis por iom da tempo la fierecon kaj ĉagrenon de la moderna feministino kaj liberigis sin, por ke ŝi komprenu kaj rakontu la spiritan penadon de teksistoj kaj kabanuloj el la plej orienta Bohemio, kie ŝi mem hejmiĝis. Moravia Slovako *Jan Herben*, progresema publikisto - de la vira insisteco, prilaboris gentan kronikon de sia kolorriĉa kaj kulture malzorgita patra regiono, sed ne devenis simpla vico da precizaj kaj pasivaj kinematografaj bildoj kiel ĉe lia samregionano *Alois Mrštík*, aŭ simpla galerio de la karakterdesegnaj genroj, kiajn en nekutima plastiko sukcesis la slovaka

rakontisto *Martin Kukučín*, sed samtempe devenis filozofio de la regiono kaj popolo, en kiu dormetas la fortoj kaŝitaj por la estonteco.

Tiamaniere iom post iom iĝis pli sonora kaj urĝa voĉo, vokanta hejmen la poetojn, invitanta ilin al la radikoj kaj donanta al ili kiel taskon zorgi pri la nacia karaktero. Sed krom tiu ĉi tendenco koncentriga, kaj ofte kontraŭ ĝi, aŭdiĝis penado kosmopolita, necesa ĉe la malgranda nacio, se ĝi ne estis kripliĝonta kaj senfruktiĝonta en la mallarĝa sfero idea kaj enhava. Jam František Palacký donis la devizon, por ke la antikva Bohemio hejmiĝu en la nova Eŭropo; en la jaroj sepdekaj la junaj verkistoj faris el ĝi poezian programon. La studadon, tradukadon eĉ imitadon de la okcidenteŭropaj modeloj ili rigardis kiel la plej konvenan vojon por alproprigi al si la idean riĉecon eĉ artistajn formojn de la moderna homo. Ili poste, dum ofta malkonsento, pretendis rajton, prilabori la historiajn, mitologiajn eĉ fantaziajn temojn de l'fremdaj nacioj; ili sin esprimadis per la stilo ekzotika eĉ tiam, kiam tiu ĉi faro estis kontraŭ la literaturo tradicia; ili kontentigis sian fantazion per la ĝuega vagado en la tempaj kaj lokaj malproksimoj. Se tio signifis bonvenantan disvastigon de la artista horizonto, - precipe sekve de multaj tradukoj, baldaŭ montriĝis eĉ la kultura danĝero, kun tiu ĉi tendenco kunigita, konsistanta el la vagemo eklektikismo, diletanta nekonstanteco, manko de la firma vidpunkto. La fortaj spiritoj el la kosmopolita skolo sukcesis venki tiun ĉi danĝeron per la persista laboro idea kaj per la memstara kreemeco; sole la epigonoj droniĝis, ne elportinte el la ebriigaj profundecoj originan verkon poezian.

Nenie tiu ĉi eklektika vagemo, kunigita kun la senĉesa ŝanĝiĝado de modeloj, stiloj kaj gustoj manifestis sin tiumezure, kiel en la poezio drama, havanta depost la jaro 1883 en la Nacia Teatro indan sanktejon, kiu estis ĉirkaŭita per amo de la tuta nacio kaj okupita per ludoj de supermezaj aktoroj. Dum la ĉefaj poeziaj majstroj de la ĉeĥa kosmopolitismo en la fako lirika kaj epika, *Jaroslav Vrchlický* kaj *Julius Zeyer* vane luktis en la Nacia Teatro por la primato per la scenaj poemoj en la kadro de la arto postklasika kaj romantika, sen sukcesi per siaj grandkonturaj, sed, plejparte nur improvizaj pruvoj meti fundamenton por la sana tradicio, frapis jam sur la ora pordego de la bela konstruaĵo per la necedema pugno la realismo, povanta teatre eĉ poezie jam fidi je premisoj de la vivo.

La publikista gvidanto de la kosmopolita skolo, *Josef V. Sládek*, estis la forta spirito kiel liaj kampulaj antaŭuloj el la okcidentĉeĥa montaro, sed li havis samtempe la delikatan koron, kiu lin, la lernanton de Jan Neruda kaj la kunulon de Jar. Vrchlický, faris kapabla fariĝi la plej pura lirikisto en Bohemio. Lia gusto estis instruita de la angla poezio el kiu li majstre tradukis Shakespeare'on en la lingvon ĉeĥan; lia vivsperto akiris multe en Ameriko, kie li ekkonis la naturon, popolon, laboron; lia koro travivis provojn de gravaj familiaj perdoj kaj turmentan multejaran malsanon. Sládek, la majstro de la kanto kaj poezia elegio, ŝtaliĝis en tiuj ĉi sortoj tiamaniere, ke al ĉiu impulso kaj al ĉiu demando pri la morto li sciis respondi per esprimo melodia, kiu samtempe estis morala faro.

Kiel la homoj de la forta spirito kaj delikata koro li serĉadis fortiĝon en la rilato kun la hejma tero kaj dank' al tio la poezio ĉeĥa estas pliriĉigita per liaj vilaĝaj kantoj, duonparte politikaj, duonparte kapricaj, en kiuj la fiero Ĉeĥo kaj klera kosmopolito Sládek eniris en la postsignojn de Čelakovský por sekvigigi post si kelkajn sekvantojn, konfesantajn la skolon nacian kaj trovantajn plaĉon en la poemverkado precipe tendenca; larĝa kaj sana humoro hanaka¹⁷⁾ fluas memplaĉe kaj feliĉe el la kantoj de *F. S. Procházka*, kiu estis unu el la plej talentaj lernantoj de Sládek.

Tian apogon ĉiam serĉadis kaj nenie trovadis malfruiĝinta kaj malsamtempa romantikulo, *Julius Zeyer*. Li amis la nacion, al kiu li apartenis laŭ la lingvo kaj konscio, kvankam neniel laŭ la raso, sed inter ĝi li sentis sin fremdulo. Per la studado kaj vojaĝado li esperis kontentigi sian sopiron je la malproksimo, sed li returniĝadis trompita, ĉar la realo neniam atingis iluzion de la revulo. Ĝuemulo de la spirito li sopiris la pasian vivon, sed asketo de la koro, vundita per la ĥimero, malleviĝadis humile ĉe la kruco. Li malŝatis modernan civilizacion, natursciencojn, burĝecon, pedantecon kaj restadis gotikulo kun postgusto de la angla prerafaelismo dum la epoko praktika kaj materialisma. Li ekprovis ĉiujn formojn, kiujn la romantika poezio liveras, plej malofte la lirikon, en kiu lia malmola esprimo balbutas sub la alfluo de sentoj aŭ mediteco, li eĉ ekprovis kun ekstera nemeritita nesukceso la dramon, en kiu plej bone sukcesis al li la fabelo. Krom la laŭromane kompleta rakonto, por kiu li mem trovis precizan esprimon de »renovigita bildo«, li plej bone verkis romanon trapenetritan multe per elementoj subjektivaj kaj liberan rapsodion epikan, skribatan per blankverso. Siajn temojn li elektadis el la vasta aro da rakontoj kaj fabeloj keltaj, romanaj, germanaj kaj rusaj, iafoje li forvagadis ĝis al la plej malproksima oriento japana aŭ ĥina, sed eĉ por li la eniro sur la hejman teron signifis regule instigon por la kreado - jam longe estos forgesitaj liaj parafrazoj de la kantoj pri Karolo la Granda, liaj versaj »Kronikoj de la amo« (»Letopisy láskey«), sed liaj vire delikataj evokacioj de la antikva heroa ĉeĥa tempo »Vyšehrad« kaj lia psikologie aŭtobiografia romano pri sopiro kaj malĝojo »Jan Maria Plojhar« ĉiam estos legataj kiel la plej bona heredaĵo de la romantika epizodo en Ĉeĥujo.

Kontraŭe al li poeto nepre renesanca estas *Jaroslav Vrchlický*. El la timema filo de neriĉa komercista familio, kruele persekutata de la sorto, el la melankolia edukito de la vilaĝa paroĥejo kaj de Praha universitato, el la sopirema lirikisto de la tradicia stilo, tri gravaj okazintaĵoj dum liaj junaj jaroj faris renesancan artiston, optimisme glorantan vivon kaj evoluon: restado en Italio, feliĉa amo plena de volupta ĉarmo kaj studado de la francaj kaj italaj poetoj. Jam en tiu tempo krom la nekredebla kreemeco poezia, kiu sekve de facileco kaj virtuozece fariĝis improviza rapidegeco, la juna poeto, posedanta miregan perceptecon kaj maloftan literaturan kulturon, malfermis sian senlacan tradukan aktivecon. Al ĝi la ĉeĥa literaturo dankas por interpretado de ĉiuj ĉefaj grandaj poeziaj verkoj francaj kaj italaj de la tempo de la renesanco ĝis la nuna

tempo; pli malfrue li tradukadis ankaŭ poeziajn verkojn germanajn. Ni ŝuldas al Vrchlický ankoraŭ pli pro tio, ke li per la tradukado de la plej komplikaj fremdaj formoj aldonis al la ĉeĥa stilo, precipe rilate la rimon kaj ritmon, neestintan formelegantecon. La originan produktadon de Vrchlický plejmulte influis Victor Hugo kaj lia kunularo - laŭ ilia spirito Vrchlický enmetis en la ĉeĥan poezion karakteron romanon, oratoran kaj samtempe kosmopolite reprezentan. De ili li transprenis la ideon pri la seninterrompa evoluo de la universo kaj de la homaro al la plej altaj formoj de la konacio; tiel manifestas sin Dio identiĝa kun la naturo, sed senlaca en la kreado kaj ŝanĝado. Por Vrchlický ne sufiĉis esti laŭdanto de la kosmaj fortoj, prezentantaj sin al ni foje kiel amo de virino, foje kiel genieco de artisto, alifoje kiel antaŭsento de pensulo aŭ fondinto de religio; li sopiris kiel Victor Hugo esti poezia eĉ profeta historiisto de la kosmaj kaj universaj okazintaĵoj. Lia tuta poemverkado atingadis ciklan karakteron kiel la rondo de la »fragmentoj de epopeo«: meditado ĉirkaŭas la simbolajn scenojn el la fabeloj, legendoj, historio, sen limigo de la materialo: kelkaj fragmentoj aliiĝas je la epopeoj, kelkaj je la tragedioj kaj komedioj, limo inter la epiko kaj medita liriko nenie estas fiksita; dike surmetataj koloroj kaj brua elemento oratora akcentigas la vidpunkton de la poeto, staranta super sia verko kun konscio de la deviga tasko.

Sed krom tiu ĉi paradema flugilo de medito kelkafoje Faust-, alifoje Donjuanmaniera, sed plejofte moderne liberalisma kaj evolue optimisma, bruetas en verkado de Vrchlický dua flugilo pli aera, pli intima, pli travivita: ĝi estas lia liriko. Post la interna resaniĝo de la poeto eksonas varma kaj forta melodio je la honoro de la maro kaj arbaroj, de la ama kaj familia feliĉo, de la penso kaj arto, aldonanta al la antika kaj reneanca ĝojo pro la vivo akcenton plene modernan. Krom la kanto la lirikisto Vrchlický prilaboras la artajn, ja nepre artefaritajn formojn romanajn, treege konvenajn por la esprimado de la sanktigitaj momentoj de la vivo, kiujn orumis la estetika kulturo; precipe en la soneto li - atingis virtuozecon. Sed al la maturiĝanta viro-poeto la vivo ne alportis sole feliĉon, ĝuon kaj ludon; liaj amaj kaj edzecaj revoj pri feliĉo kruele katastrofis; la scio kaj arto liveris maldolĉajn fruktojn; en la soleco de la spirita laboristo kaj dum la meditado pri la morto montriĝis malgrava ĉio atingita eĉ atingota. La optimisto rezignis la vorton, la trolaŭdanto de la vivo ŝirvundis sin mem per la severa memesploro, la kultura ĝuemulo lernis la humilecon. Sed lia kantema fonto daŭrigis ja soni iam post iam per la pli pura melodio, senigita de la oratoraj almiksaĵoj kaj elementoj transprenitaj el la fremdlando. Ĝuste la lastaj lirikaj verkoj de Vrchlický ravas per la ĉarmeco senta kaj esprima - la estinta lernanto de la antiko kaj de la romana arto parolas el ili neniel plu al la sentoj, sed al la koro per tiu delikateco de amo kaj kunsentado ĉirkaŭprenanta la tutan homaron, ja eĉ la tutan naturon, kiu ne neprave estis proklamata kiel signo de la slava naturo.

Jaroslav Vrchlický, kies verkoj plenigas rimarkinde ampleksan bibliotekon, kie krom la poezio kaj tradukoj de ĉiuj poeziaj specoj estas

reprezentita eĉ la literaturo kritika, kaj kie kiel malgravan parton oni trovas ankaŭ la rakontan prozon, signifas pli ol nur unika fenomeno - ĝi estas tuta liteatura kulturo. Per li realiĝis la literatura programo de Jungmann; per li estis finpensita la devizo de Neruda pri la artista kosmopolitismo, sed per li ankaŭ estis plenumita la grava faro liberiganta, ĉar nur Vrchlický nepre sendependigis la ĉeĥan poezion de la modeloj kaj tipoj de la poezio germana kaj kunigis ilin kun la eŭropa okcidento; precipe kun Francio. Ne estas miro, ke la personeco tiel riĉa je l'impulsoj instigis tutan aron da lernantoj kaj imitantoj, kiuj akiris la instruon de la samaj modeloj, sin esprimadis per la sama stilo, konkuradis kun la majstro en la samaj virtuoze uzataj formoj. Kelkaj el ili provis paciigi la artecon de Vrchlický kun burĝaj idealoj kaj dispecigis lian heredaĵon je simplanima priskribo de humoroj. Kelkaj poetoj-pastroj aplikis la renesancan parolmanieron de l'idolano Vrchlický por ĝin altigi al la lirika baroko je l'honoro de la Madono, eŭkaristio kaj Paska Vendredo. La aliaj alportis novan nuancon, transformante la sanan kaj sangoriĉan renesancon de Vrchlický en la arton rafinitan, nervan kaj ekmalsanetan. La ĉefa reprezentanto de la sekvantoj de Vrchlický en tiu ĉi maniero estia *Jaroslav Kvapil*, kiu la lirikon de amo kaj melankolian revadon interŝanĝis frutempe por la dramo kaj teatro kaj akiris eĉ ekster la limoj de Bohemio famecon kiel poeto-reĝisoro; per sia talento por dekoracio li sukcesis ŝanĝi la vivon kaj scenon je fabelon, ravantan per la sekvado de lumo kaj mallumo, de koloroj kaj movoj. Sen Vrchlický ne estus ankaŭ disvolvinta antaŭ fino de la 19. jarcento kaj sekve de la literatura ĉeĥa revolucio tiu grupo, kiun oni laŭ la franca maniero nomis grupo de dekadenculoj kaj kiu en la kritika teorio kaj praktiko energie turnis sin kontraŭ la persono de Vrchlický, levante afekte la standardon de la novromantismo, elfalintan el la mano de Zeyer. Se ne estas eble halti ĉe *Karel Hlaváček*, la ravema elegiisto de la krepuskaj humoroj kaj arĥaika armilaro, kies ĉasta kaj rompiĝema Muzo konfesis finfine, ke ŝi ne estas malforta pro enuo kaj trosatiĝo sed pro malsato, estu tie ĉi almenaŭ nomata la universala sed malmulte memstara artisto de eleganta formo *Jiří Karásek ze Lvovic*, kies ĉefa signifo estas en la liriko; en ĝi li per la sopira melodio elkantis senesperan malĝojon de palaj, ja mortpalaj ekzilintoj ella vivo, kiuj enuigitaj de ĝuo kaj forpuŝataj per samtempo forkuras en la estintecon kaj serĉas en ĝi simbolojn por ombroludado de sia interno.

La idea kaj literatura reakcio kontraŭ Jaroslav Vrchlický kaj liaj tendencoj estis neniel pli malforta ol lia influo; ĝi iris laŭ la devizo de realismo. Ĝiaj komencoj, havantaj karakteron esence sciencan, aperas en la epoko de la ĉeĥa scienca renesanco en la tempo de 80-aj jaroj, kaŭzita per la renovigo de la ĉeĥa universitato en Praha. Tiam ricevis novan aspekton eĉ la ambaŭ fakoj, kiuj ĉiam influadis la nacian kaj literaturan vivon, lingvistiko kaj historiesploro: la lingvistikon starigis sur la vastan fundamenton komparan la kvieta klasikulo de la vortevolua klarigo *Jan Gebauer*, la historion laŭ vidmanieroj okcidenteŭropaj plenigis la lerta majstro de detala kritiko *Jaroslav Goll*. La idean enhavon al la ĉeĥa realismo donis la filozofo *T. G. Masaryk*, kiu, antaŭ ol li sin dediĉis al la

politiko, en kiu li fariĝis liberiginto de la nacio kaj kreinto de la ĉeĥoslovaka ŝtato, influis la nacian vivon tre efike kiel scienca organizanto kaj kiel kritikanto. De verkisto tiu ĉi admiranto de la grandaj rusaj romanverkistoj postulis precizan ideon pri la mondo kaj vivan rilaton al la etikaj problemoj de la estanteco; li instigis lin por ke li, liberiĝinte de la mortiganta historiismo, studadu realon ĉirkaŭ si mem kaj ne akceptu antaŭjuĝojn, sanktigitajn per la tradicio eĉ se ĝi estus plej honorinda; kontraŭ la artista ludo kaj diletanta ĝuemo li akcentis moralan veremecon de l' poeto, kiu ne rajtas eviti la tuthomaran taskon de la nova tempo, nome la organizatan klopodon pri la sociala justeco. Tiuj ĉi postuloj signifis superecon de la vidpunktoj enhavaj kaj ideaj super la kriterioj formalaj, pliŝatis ĉe la verkisto la arton observan ol kreemajn kvalitojn, metis la belan literaturon al la servoj de socialaj tendencoj kaj morala eduko. Entute ili ne estis novaĵo, ĉar la amo por realo ekzistis en la ĉeĥa literaturo antaŭ longatempo, kaj intereso pri socialaj problemoj estis metita kiel tasko al la ĉeĥaj verkistoj jam de Neruda, sed ili efikis nun tre potence, ĉar ili alkonformiĝadis al la tuta medio eŭropa kaj kun bela entuziasmo estis proklamataj per la personeco eksterordinara: per la homo de la universala scio, sentanta senerare la urĝajn bezonojn de la patrolando, la idealisto vivanta kaj pensanta en la interkompreniĝo kun la malnova tradicio de la ĉeĥa historio kaj samtempe rigardanta en la estontecon kiel kritika filozofo, sub kies ŝajne racia malvarmo kaŝiĝis fajro de la kreema celado.

Inter la verkistoj, akceptintaj la principojn de Masaryk, ne estas multo da poetoj; kaj eĉ tiu, kiu el ili montris la plej altan gradon de fantazio kaj ritma talento, estas laŭ esenco pli ĵurnalisto de granda stilo ol artisto. Li eatas *Josef S. Machar*, la danĝera polemikisto kaj eminenta felietonisto, demokrato kaj liberpensulo de la kapo ĝis la piedoj, en kies akra prozo kaj sekaj versoj treege sin esprimas la ĉeĥa staro kontraŭ Wien kaj Roma kaj samtempe revolucia konscio de la proletariaro. Liaj komencaj verkoj lirikaj estis nepre subjektivecaj kaj iom rememorigis la junan Neruda'n, sed peza krepusko de jarcento envolvis en siajn ombrojn Machar'ajn tipajn konfliktojn inter la ekscitita sento kaj malfidema raciemo, lian kruelan kaŭzaron de amo pli nerva ol senta. La racio kritikema kaj analizema venkis poste en la unuaj libroj, skribataj per akra plumo de la satirikisto en la komenco de la longjara loĝado en Wien: senkompata juĝo pri politiko, rilato de la socio al virino, publika moraleco, disklasigo de la socio, logiko de la historio prenis sur sin klarajn, ofte eĉ trivialajn formojn, en kiuj la elemento lirika cedis ĉiam pli evidente al epiko. La studado de historio, fervora okupado pri antiko, kelkaj vojaĝoj en Italion finigis la revenon de Machar al la objektiveco, tiel ke en la lasta epoko de sia poezia aktiveco la poeto dediĉis sin ekskluzive al la vasta ciklo de epikaj poemoj, kiuj sub la titolo »Tra la konscienco de jarcentoj« (»Svědomím věků«) esprimas epopeon de la homaro plej feliĉe tie, kie la sentima ĉizilo ĉizas figurojn de la roma imperio aŭ kie tiu ĉi ĵurinta kontraŭulo de eklezio kun akraj trajtoj reaperigas scenojn el la ĉeĥa reformacio kaj kontraŭreformacio. Sed tie ĉi ni estas treege malproksime de la

pure artistaj evokacioj de Vrchlický: la ĝuego de la poeta vizio absolute cedis al la morala juĝo pri la historio, la renesanca ĝojo pro la vivo estas anstataŭigita per malmola kulto de forto kaj devo, la ĉarmo de la naturo kaj estetika ludo estingiĝis sub la severaj kaj seniluziaj okuloj de realisto kaj demokrato. La skolon de Machar trairis, sed de ĝi liberigis sin Petr Bezruč, la poeto de unusola libro, rigardata kun rajto kiel zenito de la ĉeĥa politika poezio samtempa. En la rapsodiaj verkaĵoj de la raviganta patoso kaj de la karaktero perfekte popola ektondris la solula kantisto Silezia al la konscienco de ĉiuj, kiuj forgesas, ke sur la teritorio de Ostrava kaj Těšín pro la poloigado kaj germanigado pereas la tuta branĉo de la nacio ĉeĥoslovaka; kuniginte akuzon naciecan kun protesto sociala, li suprenlevis la turmentojn de minlaboristoj de la limteritorio ĉeĥopola sur altecon efektive tragedian. Tio, kio estas nomata ĉeĥa realista prozo rakonta kaj romana, montras ĉe la granda nombro de verkistoj kaj verkoj diversan karakteron. La hejma tradicio observema, kiu de la malnova figurfaranto kaj saĝparolema popola edukisto *Alois Vojtěch Šmilovský* etendiĝas ĝis V. Hálek kaj B. Němcová, kuniĝas tie ĉi kun la multenombraj impulsoj fremdaj, preripe de la rusa romanpsikologio kaj franca rakontarto: kvazaŭ pitoreska intereso pri la karakterizaj figuroj, avida volo dispartigi la societon laŭ klasoj kaj profesioj, la antikvoĉeĥa kompreno por demandoj moralaj, ĉio tio helpas krei romanajn verkojn, tre gravegajn por la kono de la reala vivo en Bohemio, kie pli evidente terkulturisto cedas konstante al la fabrik-laboristo kaj kie burĝaro tute demetas la patriarkajn formojn, alkonformiĝante al la moroj kaj pensmanieroj de la okcidenta Eŭropo. La pli maljunaj el la ĉeĥaj realismaj rakontistoj verkas laŭ la maniero personpriskriba kaj montras ĉe la figuretoj plename observitaj, kiel formoj de la vivo transformas homajn karakterojn, starigante ilin antaŭ la specialajn moralajn problemojn. Tiele verkadis *Ignát Herrmann*, kaprica kaj kompatema kronikisto de la neriĉa burĝaro de Praha, la majstro de la kronika desegno, aŭ *Karel V. Rais*, seniluzie verama raportisto pri la naciaj kaj klasaj konfliktoj de la kampuloj kaj dometposedantoj en regiono apud la montĉeno Krkonoŝe, amanta la kampulon en lia ligo kun la tero.

La socialan grandstilan romanon, kiun havis antaŭ okuloj jam kelkaj rakontistoj de la generacio de Neruda, pripensis la psikologistoj de la ĉeĥa burĝaro, malkontentigitaj ĝis la fundo de animo pro la moralaj krizoj de sia klaso, malsaneta eĉ fizike; sed kie *Matěj A. Šimáček*, pentristo de la fabrika vivo, atingas la humilan rezignacion, fidon je la regeneracio de gento per la freŝa sango de kamparo kaj la evangelion de laboro kaj kompatemo, kaj kie la enmigrinta Moraviano Josef *Merhaut* sanigas siajn figurojn de la morala bankroto per la mistiko unufoje katolike religia kaj alifoje nacieca, tie la bruema feministino *Božena Viková-Kunětická* decidas por la morala ribelo virina, direktata kontraŭ la fundamentaj formoj de la ĝisnuna kunvivado de ambaŭ seksoj. Realismo ofte signifas, ke la observiata agado en la verkisto superas lian imagan kreemon kaj ke en la temo pozitive interesa tute perdiĝas la personeco

de la poeto, kaj pro tio la verko suferas pro manko de artistia libereco kaj origina poezio; laŭ tiu vidmaniero la preparolitaj romanverkistoj estas tipaj realistoj.

Kiel en la tempo de Neruda la realismo epika trovas sian aldonon en la realismo teatra, kiun en siaj maturaj ludoj jam atingis *Ladislav Stroupežnický*, iam faradisto de bruaj historiaj tragedioj kaj lignoskulptisto de arĥaika skizo: se al li antaŭe sufiĉis vigla movo de kolorplenaj figuretoj popolaj, kiuj eĉ pli malfrue en vilaĝaj ĉeĥaj dramoj ne mankis, maturiĝinte li rimarkis, ke li devas ĉerpi tragediecon el la sociaj fluoj de la samtempa vivo, kie agoj de la individuo havas socialan influon. Kvankam li ne plenumis ĉion, kion li ekpensis, li tamen malbaris la vojon al la posteuloj, kiuj poste en la temoj laboristaj kaj burĝaj, studentaj kaj artistaj sub la kolora supraĵo de la precize observita realo serĉadis pli profundajn fluojn, ofte kun malofta talento de rimarkinda karakterpriskribo, malofte kun la sukceso koncerne la esenco de tragediaj konfliktoj. La nomoj de tiuj ĉi realistaj dramistoj plejparte estas la samaj kiel tiuj de realistaj rakontistoj; tamen unu el ili, *Jaroslav Hilbert*, kvazaŭ ekskluzive uzas la klaran kaj kuraĝan formon scenan, en kiun li komence enigis karakterizajn analizojn de novepokaj virinaj animoj, poste sintezajn rigardojn en la historian heroecon, fine netragediajn bildojn de la burĝaj mastrumoj. Kiel Hilbert tiel ankaŭ la pli junaj dramistoj ĉeĥaj malŝatis la honoron kaj danĝeron de problemeco de Ibsen kaj anstataŭ scena kritiko pri vivo ili sindonas al la sistema priskribo de ĝiaj kulminaciaj momentoj samtempe kelkafoje enfalante en la teknikon iom epikan.

Sed la evoluo ne estu antaŭirata! Malvarme objektiva realismo de la modere reformaj intencoj, kiu regadis la ĉeĥan prozon je la fino de la naŭdekaj jaroj, ne povis sufiĉi por la pli junaj romanverkistoj de la pli fajrreca temperamento, sopirantaj, en la individue prezentitan kaj kuraĝe stiligitan bildon de realo enpreni kiel eble plej multe el sia individueco kaj samtempe plenigi la epikajn verkojn per iluzio de la vivo pligradigita. Elirinte el la realismo kaj naturalismo, ili dum la evoluo liberigas sin de ĝi kaj kreas al si mondon de la memrajta leĝeco. La humorplena lirikisto kaj varma pejzaĝpentristo *F. X. Svoboda* kunigas vilaĝan saĝulon kaj modernan deterministon kun la poeto, kaj en la psikologiaj rakontoj kaj sociaj romanoj li atingas impreson de la tuteco de vivo, li pentru novajn vilaĝanojn de sia hejmo en la meza Bohemio aŭ priskribu la burĝaron de Praha. Malsereniĝa kaj nepaciĝema pesimisto *Josef K. Šlejhar* poezie aliformigas al si la mandon de erarirantaj homoj, de suferantaj bestoj kaj vivigitaj objektoj en timigan vizion preskaŭ de febra karaktero, sub kiu petege ĝemas la kompatato kaj sopiro je la savo. Neelĉerpebla rakontisto kaj mireginda spertulo de ĉiuj profesiaj medioj de la vivo *K.M. Čapek* amas super ĉio multimeman groteskon, kies komponantoj kaj motivoj kun rava vereco estas transprenitaj el la vivo, sed kies sumo efikas fantazie; sub la malboneco, fuŝeco kaj malriĉeco, kiuj kuraĝe estas grupigitaj en liaj romanaj kronikoj de Praha, timtremas ofte la suferanta koro homa, per la suferado sin puriganta. *Vilém Mrštík*, la fervora psikologo de junaj koroj studentaj, posedas talenton esence pentristan: fluu en liaj scene malriĉaj sed por observanto valoraj verkoj romanaj

abundeco de la suno super la libera kaj arbaroriĉa regiono, aŭ ŝanĝu en la nervema aero antikva Praha sian nekalkuleblan aspekton, liaj koloroj ĉiam impresioniste oscilas, trembrilas, flamas kaj allogas.

La eminenta loko en la evoluo de la ĉeĥa rakonta prozo estis ĉiam atribuita al la verkistinoj; post Božena Němcová, Karolina Světlá kaj Teréza Nováková tiu ĉi tasko estis donita al *Růžena Svobodová*. La realismo estis por ŝi skolo de la preciza observado de aferoj, medioj kaj animoj, kiun ŝi trastudis rapide kaj kun valoraj rezultoj; impresionismo, subtenata ankaŭ per la kulturo plastika, akriĝis ŝian vidosenton; la sociala kaj emancipa celado samtempa profundigis ŝian moralan senton por la justeco kaj ĉasteco; profitplena studo de literaturoj, artoj kaj praktika filozofio, same kiel la malproksimaj vojaĝoj igis el ŝi la konscian artistinon de vastaj kulturaj horizontoj. De la monografia portreto de la ĉasta virina personeco, perdinta dolore iluziojn en kontakto kun la vivo, Růžena Svobodová paŝis al malsimpla romano socia, en kiu la ĉeĥa kaj eŭropa realo estas stiligita kaj superstiligita laŭ la tendenco de la evoluema deziro de la verkistino kaj ofte per la maniero novoromantika. Sed la propra regiono de ŝia rakonta arto estas psikologie prilaborita novelo, same feliĉa tie, kie ŝi rakontas tipajn sortojn de la instinkte puraj figuroj, kreskantaj el la sino de la naturo, kiel tie, kie ŝi ekkaptas erotikajn krepuskojn en la amoj rafinitaj - la spertulinon pri animoj kaj pejzaĝpentristinon kompletigas la delikata stilistino de la kolora nuanco kaj melodia kompozicio. Per Růžena Svobodová la evoluo de la ĉeĥa romana arto ne finiĝas: kelkaj el ŝiaj gelernantoj celas al la anima profundigo, aliaj al la pli severa forma konstruo de romanoj kaj rakontoj; kun la novoromantikistoj, kiuj propravole eksiĝas el la estanteco, konkuras la junaj naturalistoj, zorgantaj pri detala pentrado de la medio; la koncentriĝintaj esplorantoj de la ekskluzivaj karakteroj kaj sortoj individuaj renkontiĝas kun la sociale antaŭjuĝemaj interpretistoj de la grandaj samtempaj tendencoj. Estus tro frue amasigi nomojn tie, kie temas pri la honora lukto de la artistoj nur serĉantaj kaj ĝis nun malproksimaj for de la natura majstreco.

La foriron de realismo al la pli spirita arto, de simpla reproduktado de realo al la stila leĝeco, de stilo seke raportanta al kolorriĉa, nuancita kaj individua stilmaniero, la romana prozo ĉeĥa same kiel la dramo kaj la liriko ne estus povintaj plenumi sen abunda helpo, kiun la literatura kritiko al la ĉeĥa beletristiko liveradis laŭ mezuro ĝis nun nevidata. De la komenco de la naŭdekaj jaroj estis al ĝi destinita gvida tasko kaj ĝi pri tiu ĉi respondecas konsciiĝis per siaj ĉefaj reprezentantoj.

Ilia gvidanto estas *F. X. Šalda*, en kiu krom akra kritikisto kaj literatura sciencisto dormetas ankaŭ poeto, eksperimentanta de tempo al tempo en la diversaj fakoj. El Francio en Bohemion alportis F. X. Šalda precizan kritikan metodon; kreis kritikistan terminologion; kun unika sento por la formo li donacis al siaj samlandanoj stilon de tema studo (stilon de franca "essay"), per kiu li mem skribis kelkajn klasikajn verkojn de profunda koncepto, konvinka retoriko kaj esprima ĉarmo. Tie li sinteze resumis ĉion, por kio li luktis en akraj

polemikoj kaj kion li pruvadis per la multjara praktiko kritikista: nome, ke arto devas elkreskadi el la vivo kaj revenadi al ĝi kiel ĝia multiganto; ke poezia verko devenas nek per imitado de modeloj nek per ellaborado de raciaj tendencoj sed per organisma lireado, kies kondiĉoj estas la veramo en la vivo kaj artista praktikado; ke la formo ne disigeble estas kunigita kun la enhavo kaj en ĝi kaŝiĝas la plej personeca esprimo de individualeco de aŭtoro. Kiel Masaryk en la tempo de realismo, tiel F. X. Šalda en la sekvanta periodo fariĝis idea gvidanto de la ĉeĥa literaturo - kritiko anstataŭis filozofion.

Eĉ en tiu ĉi tempo estis liriko, kiu esprimis la plej altan celadon de la nacia animo per formo same nova kiel artista; pli forte ol en romano kaj dramo estis per ĝi esprimitaj

morale regeneraciaj penadoj sociaj, aŭdiĝantaj de la aperiĝo de Masaryk kaj de la politike-ŝocia revolucio de 90-aj jaroj, nomata, "Junularo" (Omladina): la koro de la nacio mem faris konfeson per versoj kaj metaforoj de siaj lirikaj poetoj. En ilian vicon idee apartenas J. S. Machar, sed liaj artistaj rimedoj pliproksimiĝas al realismo; la perfektaj reprezentantoj de tiu ĉi lirika grupo estas *Antonín Sova* kaj *Otakar Březina*; ilia poezia verkado esence jam estas fermita. Antonín Sova kaj Otakar Březina estas filoj de suda Bohemio, kie naskiĝis religia ideo kaj ekscitita sentemeco, kiu antaŭ jarcentoj esprimis sin per la reformacio; tiu el sia hejmo kunportis pli eble incititan sentemecon, tiu ĉi pli eble religian meditemecon. Ili ambaŭ forlasis frutempe sian naskiĝhejmon, sed portas kun si fidele ĝian bildon, oficisto kaj bibliotekisto Sova en Praha, ekscitita de naciaj kaj socialaj luktoj, instruisto Václav Jěbavý (tia estas la familia nomo de Březina) en solejo de Moravia kamparo, konvena por disciplino, koncentrata meditado kaj idea eĉ poezia ekstazo.

Sentplena kaj sentema revulo Antonín Sova komencis sian artistan vojon en la mezo de versfarantaj skizistoj kaj realistoj kiel impresionisto de tre delikata strukturo kaj tia li efektive restis por ĉiam; ni aldiras, ke lia impresionismo havas karakteron rimarkinde muzikan. Per verso delikate melodia kaj per bildo, posedanta timemon de pastelo, li sukcesis ekkapti ne nur nuancon de pejzaĝo, humoron de melankolia aŭ perfidema amo, briletantan aeron de la granda urbo kune kun ĝia miksaĵo de beleco kaj teruro, sed eĉ la sentan fantomon akompanatan meditatedon. Antonín Sova meditis pri renaskiĝo de la socio, pri proksimeco de revolucio, pri heroa misio de la malgranda popolo, kiu meze de malamikoj denove estas kuraĝiĝanta al aventuroj de braveco, de savanta povo de amo, ofero kaj solidareco. Tiel Antonín Sova, la poeto kun harpo Aiola en la subtila kaj dolorema animo, ne malatentigis eĉ unusolan pensan ekstremon de la amata nacio dum la malkvietaj epokoj de la revoluciema "Junularo" ĝis la renoviĝo de la politika memstareco ĉeĥoslovaka; sed kio el ĉiu penso lin allogadis plej multe? Ĝia senta parto, ĝia humora fosforeco, ĝia ĉarmo "ekvibriganta solulajn kordojn de animo".

Tute alie la afero estas ĉe Březina. Akirinte sian instruon ĉe mistikuloj hindaj kaj kristanaj, studinte la skolon de modernaj filozofoj kaj natursciencoj,

prilaborinte impulsojn de sociala kaj etika novoidealismo, li dediĉis sian tutan vivon de melankolia solulo al metafizika meditado, kiu fariĝis lia ekskluziva pasio, kiam li estis rezigninta la feliĉon en la ama aŭ amika kuneco. Ne plenajn dek jarojn Otakar Březina dediĉis por esprimi la spertojn kaj certecojn pri sia filozofia penso; por tio ĉi sufiĉis al li sole kvin kolektoj da poemoj kaj unu kolekto da prozaj artikoloj, tiel ke li apenaŭ tridek kvin jara, povas demeti la plumon kaj enprofundiĝi en la mistikan meditadon, signifantan silenton. Plenigita de la persona doloro koncentriginta ĉiajn malĝojojn de koroj kaj kapoj el la fino de la jarcento, Otakar Březina trapenetrigis frutempe sian animon per mistika flama deziro je Dio, per ĝoja amo al sorto kaj universo. Rezigninte poste la personecan poezion, li flamas en tiu ĉi spirita ĝojego kaj kantas en ĝi al la homaro himnojn kaj preĝojn, en kiuj li esprimas sian solidarecon, sian fratan senton kun ĉiuj pensantaj, laborantaj kaj suferantaj estaĵoj. Tiamaniere en liaj verkoj atingis esprimon ne nur la tendencoj de Eŭropa novoidealismo, sed ankaŭ la pramalnova idea tradicio de la tuta revolucio: kiel Hus, Chelčický, Komenský kaj Palacký tiel ankaŭ li ne trovas pli altan taskon kaj pli grandan saĝecon ol vivi per Dio kaj kun Dio, serĉi kaj plenumi lian volon, ekkoni kaj ami en la universo kunsenton kun liaj leĝoj. Sed kiel la religieco de Ĉeĥoj en pasintaj tempoj tiel ankaŭ religieco de Březina havas samtempe karakteron praktikan, prenante en sin trajton socialan kaj sanktigon moralan. Li predikas - plej bele en la lasta poezia verko "Manoj" (Ruce) - evangelion pri kunhelpado de ĉiuj, kunlaborado de milionoj vivantoj, mortintoj eĉ naskiĝontoj, postulas kunpenadon kaj helpeman energion, serĉas kaj efektivigas leĝon de nova ordo sociala, kiu estas plej justa ĉar ĝi devenas de Dio. Tamen eĉ laŭ arta vidpunkto la verko de Březina estas efektiviĝo kaj superiĝo de la tradicio de ĉeĥa poezio, precipe de tiu, kiu komenciĝas per Jaroslav Vrchlický. Otakar Březina, la perfekta majstro de la fermita formo kaj libera verso, la poeto de la plej personaj preĝoj eĉ amasaj himnoj de ĥora karaktero, prilaboris sian verkon kiel ĉizelisto, ĝis li alkondukis ĝin al perfekteco kvazaŭ absoluta; estus malfacile trovi en la tuta samtempa liriko eŭropa artiston, kiu en la imaga ekstazo tiamaniere majstrus patoson de penso kaj per kuraĝa kaj riĉa metaforo tiamaniere volbus ponton inter la floranta mondo de aeraĵoj kaj aera mondo de ideoj.

La supron, kiun la ĉeĥa poezio atingis per Otakar Březina, restis laŭ sia mistika karaktero por la sekvantaj lirikistoj neatingebla; ilia vojo kondukas de monta pinto en la valon, inter homajn ĝojojn kaj malĝojojn, al lumantaj kaj fumantaj fajroj de vivo. Nur la dramatika lirikisto la frutempe mortinta *Otakar Theer* penis en sia obstina kaj fiera menso pri absoluteco religia, morala kaj artista, sed ne forgesinte siajn ĝuemulajn komencojn, li akompanis sian serĉadon per verva, ja eĉ nuda konkreteco de imago kaj esprimo, ĉiam pasie travivita; la peno pri libera verso, inaŭgurita jam per Sova kaj Březina, atingis ĉe li la plej altan gradon. Lia antipodo ĝis certa grado estas *Karel Toman*, la pura lirikisto de la fermita formo kanta, kies ambicio celas densigi sentajn aventurojn en la plej malgrandan spacon versan kaj samtempe havigi al ili demonstran plastikon. Tia

konciza poezia esprimo proksimiĝanta parte al kanto, parte al senteco, plaĉis en lia liriko ankaŭ al *Viktor Dyk*, la plej produktema el la junaj poetoj ĉeĥaj konata eĉ en la romano, rakonto kaj dramo, krom tio ankaŭ la eminenta politika ĵurnalisto kaj satiristo de timata sprito. La skeptiko kaj ironio jam estas kunnaskitaj ĉe tiu ĉi dorsflanka romantikulo, kiu sian propran profundan sentemon persiflas ne konfidante sian fantazion strange kaprican. Tamen lia tuta evoluo celas venki tiun lian naturan skeptikemon kaj ironiemon por finatingi, aŭ pli eble finpensi kaj per doloro akiri absolutan certecon. Li ĝin serĉae nek ĉe Dio, nek en la brakoj de virino, nek en la sino de la naturo, sed en la maldanĝera unueco kun la nacio, tamen tiun ĉi unuecon lia kavalire fiero necedema menso povas akcepti nur tiam, se la karakterhava nacio starus sur libera tero. Tiamaniere Viktor Dyk, samregionano de Svatopluk Ĉech kaj iom sekvinto de Jan Neruda, alvenis al la poezio de la ĉeĥa nacionalismo kaj restis al ĝi fidela kun la konsekvenco de la efektiva viro kiel en la tempo de la politikaj malordoj, tiel ankaŭ en la epoko de la militaj suferoj: la politika sarkasmo, lirika dialektiko, spiritplena parolturno servis al li en liaj koncizaj kaj aludplenaj versoj, por ke li avertu, ne forlasi ion ajn de la idealo formulita jam en la nacia renaskiĝo. Li en plena krea forto ĝisvivis tion, ke tiu ĉi idealo efektiviĝis per la starigo de la ĉeĥoslovaka respubliko. Sed tiam denove vekigis en li estinta romantikulo. Li ne kontentiĝas per tio, kio jam estis akirita, sed ĉiam instigas al pli alta idealo; li preferas esti Don Quijote de idealo ol kontenta parazito de komforta realo; la sankta malkvieto, bolanta en li, estas risorto de la morala evoluo.

Nek la ĉion kontraŭstaranta idealismo de Theer, nek la kavalireco de neatingebla de Dyk esprimas idealon de la vivo kaj poezion de la hodiaŭa lirika junularo ĉeĥa. Tiu ĉi elektis al si majstron, retorikiston de sane avidaj sentoj, kiu trairinte la dekadencan, ĵetis ankron en ĝojan naturismon: *Stanislav Neumann*, la panegiristo de la vivo en ĉiuj ĝiaj formoj, de produktema naturo kaj maŝina civilizacio, de libera birdaro en la aero kaj de laboranta laboristaro, de bruetanta rivereto kaj respiranta urbo, transportis la mistikan vorton de Otakar Březina »dolĉe estas vivis« sur la teron, ŝargis ĝin per vitalismo iom kruda kaj per panteismo iom tro primitivega. En lia elokventa, volupta, plastika himnado pri la vivo sole kaj sole empiria, trovis sian esprimon la ebriigo de la popolo, avidanta ekkunsidi ĉe la festeno de la vivo. En malmultaj lokoj en Eŭropo estas al la popolo liverata tiom, kiom en la respubliko ĉeĥoslovaka, konstruita konsekvence sur la fundamento de la sociala leĝdonado, laŭ la spirito de solidareco de ĉiuj klasoj kaj kun la evidenta celo protekti kaj bonfartigi klasojn laboristajn. Sed nur tiam ĝi estos festeno de la benata vivo, kiam la supozo por tiu ĉi festeno fariĝos produktiva laboro, nome se ĝi okazos laŭ la tradicia tendenco de tiuj ideaj valoroj, kiuj plej precize speguliĝas en la ĉeĥa literaturo dum la ses jarcentoj de ĝia evoluo.

- 1) Husanoj: partianoj de Johano Hus.
- 2) Cirilo kaj Methodeo: alavaj apostoloj.
- 3) Moravio : lando de la ĉeĥoslovaka respubliko.
- 4) Aleksandreido: antiva poemo pri Aleksandro la Granda.
- 5) Gnoma riĉco: enhavanta esencajn proverbojn kaj sentencojn popolajn.
- 6) Ĥiliasmo: kredo je venanta regno de Dio sur la tero.
- 7) Tábor: urbo en la suda Bohemio.
- 8) indigna atakparolo.
- e) Utrakvistoj: Husanoj, kiuj distingiĝis de katolikoj laŭ la komunio el la kaliko.
- 10) Kralice: malgranda urbo apud Náměšť n. O. en Moravio.
- 11) El la kvar historiaj landoj de la ĉeĥoslovaka nacia teritorio nome: Bohemio, Moravio, Silezio kaj Slovakio, la politike plej grava havas antikvan nomon Bohemio, laŭ kiu ankaŭ la Ĉeĥoj ofte estas nomataj Bohemoj. Se ni uzas la vorton Bohemio, la teksto koncernas pli la geografian teritorion de la unua el la kvar ĉeĥoslovakaj landoj. Sed se ni uzas la vorton Ĉeĥio, la afero koncernas la loĝantaron de Bohemio kaj de la tri ceteraj nomitaj landoj.
- 12) Ruse »byliny«, epikaj kantoj pri legendaj herooj kaj iliaj faroj.
- 13) germane: Jeschkenberg
- 14) Malá strana: kvartalo de Praha.
- 15) Bohemo: malregule vivanta homo.
- 16) germane: Böhmisch Glatz.
- 17) Hanakoj: Nacia gento en Moravio.